

1975 marto

68-a jaro

n-ro 831 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

ke eble ankaŭ ĉi tiu numero de la plej vaste legata periodaĵo en la Internacia Lingvo ne enhavas novaĵon el via lando, kvankam oni ne povas dubi pri la internacieco de la numero. Ne temas pri redaktora kaprico, sed pri simpla fakto, ke neniuj sendis informon pri lastatempa okazintaĵo ĉe vi. Ne diru, ke nenio okazis! La t.n. laborsezono estas aŭ devus esti proksima al sia kulmino. Cetere, eĉ se nenio okazis kaj okazas, se vi skribos al ni pri la kialoj de tia situacio, — ankaŭ tio povus esti novaĵo. Ne nepre necesas verki tutan longan artikolon, sufiĉas nur surpaperigi kelkajn faktojn pri okazintaĵo aŭ planata entrepreno. Ni verkos artikolon surbaze de faktoj, kiujn vi disponigos. Se vi ŝatas la internaciecon de nia revuo, aldonu al ĝi la dimension de via lando.

Ĉi tiu numero alportas ampleksan prezenton de la nuna financa stato de UEA kaj artikolon pri la preparoj por la necesa revalidigo de la jura personeco de la Asocio. Pluraj kontribuoj tuŝas la lingvan problemon en la nuna mondo. En la recenzo-rubriko dominas la prezento de la kvin fakaj kajeroj de prof. Kawamura, dum la rubriko Loke-Fake-Persone klopodas konservi siajn kutimajn variecon, aktualecon kaj internaciecon. La membrostatistiko por la pasinta jaro invitas al plurdirektaj esploroj, komparoj kaj analizoj. Tamen, la rubriko kun 15 leteroj de niaj legantoj versajne montriĝos unu el la plej interesaj eroj en ĉi tiu numero de la revuo.

Enhavo

- 41 Preparoj por la nova statuto de UEA: Jura kontinueco de UEA (Uwe Joachim Moritz)
- 43 La financo de UEA: La problemoj kaj kiamaniere venki ĝin
- 46 Belarta jubileo, Premio Raymond Schwartz, Premio Luigi Minnaja, Foto 75
- 47 La lingva kaoso: Lingva egalrajteco fariĝis aceteblo varo (sm)
- 48 Brusela batalo, Eŭropa pasporto, Eksperimento en Nov-Zelando, Reklamado, Bona programo
- 49 La libromarketo: Pleje vendataj libroj en 1974
- 50 Leterkesto
- 52 Recenzoj ("Fundamentaj konceptoj en kemio", "Enkonduko en organikan kaj biologian kemion", "Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj", "Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinoj", "Informado kaj dokumentado pri kemio", "La foraj steloj", "Kompleta lernolibro de regula Esperanto"), Laste aperis . . .
- 54 TEJO-paĝo: Vekiĝo en Ateno, Vintra Inowrocław, La plej suda grupo, Karavano al Fredericia
- 55 Kongresa komunikado: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso
- 56 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 58 Oficiala informilo
- 59 La membraro de UEA en 1974 (membrostatistiko), Nekrologoj (C.N. Ayres, J. Csapó, K. Kraujniš, M. Loibel, G.C. Sack, J.H. Vink)
- 60 Esperanto en radio, Anoncetoj

La kovrilo

La 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kun novaj eroj en la programo kaj riĉa bukedo de artaj kaj kulturaj aranĝoj, promesas agrablan semajnon al siaj partoprenantoj. Ne nur la fama "Tivoli", sed ankaŭ la "Cerva Parko", norde de Kopenhago, proponas sian famon de "la plej vasta amuzejo en la norda parto de Eŭropo".

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Dénœl, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Jura kontinueco de UEA

En la nuna Statuto de UEA, la Art. 1 devigas nin okupiĝi pri nia estonta organiza formo, ĉar — se ni nenion entreprenos — la 27an de aprilo 1976 la Asocio perdos sian juran ekziston. Prof. Lapenna atentigis jam plurfoje, longe antaŭ la 59a UK en Hamburgo, pri la neceso ŝanĝi ne nur la datojn (t.e. decidi pri pluekzisto aŭ refondo de UEA), sed modifi plurajn erojn en la nuna Statuto. La Komitato de UEA, en Hamburgo, elektis kvarpersonan Komisionon pri Statuto (s-roj Anjer, Norvegio; Schleicher, Danlando; d-ro Röhl kaj Moritz, ambaŭ FR Germanio). Intertempe aro da aktivuloj diskutis du skizojn, kaj s-roj Anjer, Moritz kaj Schleicher, kune kun la kompetenta estrarano d-rino F. Szabó-Felső, dum semajnfina kunsido en Kopenhago (1975-01-04/05), ellaboris antaŭprojekton, kiun la Estraro de UEA diskutis komence de januaro 1975. Ĉar la Komitato prefere dum la 60a UK en Kopenhago decidu pri projekto, la Estraro dum sia aprila kunsido denove detale revenos al tiu ĉi afero. Por jam nun konsulti la membraron, ĉi-sube estas prezentataj la ĉefaj ideoj el la antaŭprojekto de la nova statuto.

La bazaj principoj

KLOPODOJ ellabori novan konstitucion ne signifas kreon de nova asocio. Alivorte, la karakterizaj elementoj, la fundamentaj principoj de UEA restos netuŝitaj. Konkrete: La celo de UEA restos la solvo de la monda lingvo-problemo per la Zamenhofa lingvo Esperanto, kaj la neniel ŝancebla fundamento de la tuta agado de tiu ĉi universala organizaĵo estos, kompreneble, ankaŭ laŭ la nova projekto de la statuto la **neŭtraleco** rilate kiujn ajn ideologiojn, rilate naciecon, rason, religion, politikon kaj sociajn problemojn, kun la sola escepto, ke ĝi ne povas esti neŭtrala rilate la lingvan problemon, kiu ja estas samtempe politika kaj socia problemo. Laŭ la nova projekto, respekto de la homaj rajtoj, formulitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, estas por la laboro de UEA esenca kondiĉo.

La strukturo kaj funkciado


Ŝajnas superflue akcenti, ke la Komisiono proponas neniel ŝanĝi la strukturon de UEA. Do, kune kun la kolektive — pere de landaj kaj fakaj asocioj — aliĝintaj membroj, ekzistos la individue membriĝintaj anoj. Oni jam pli frue sugestis iom plinetigi la nunan Statuton tiusence, ke en ĝi ne plu aperu "Apogantoj" (Art.12) kaj "kunlaborantaj nealiĝintaj fakaj asocioj", ĉar ambaŭ havas neniajn funkciojn el la statut-jura vidpunkto.

Pluraj aktivuloj, interalie siatempe ankaŭ prof. Lapenna, rekomendis doni al la individuaj membroj pli grandan rolon, ol ili nun havas. La plej grava argumento por tia modifo estas la evidente pli intima ligiteco inter tiuj membroj kaj UEA, kompare al la kolektivaj anoj: Individua membro ricevas pere de la asociaj periodaĵoj plej ampleksajn kaj aktualajn informojn pri la stato de la tutmonda Esperanto-movado, senpere kontaktas la organojn de la Asocio kaj — pagas la 50-oblon de la kotizo de la kolektiva

membro. Tial tiuj membroj havu pli grandan influon al la asocia gvidado kaj elektu **rekte** pli da komitatanoj B. Tiel la ĉi-rilate ofte tute ne demokratia elemento de delegitoj (Kiu vere elektis ilin?) estas prave eliminebla. Ĉu estus juste elekti 1 komitatanon B je ĉiu komencita duonmilo da individuaj membroj, do nuntempe proksimume 15?

Ĉi-rilate trudas sin la demando pri la reprezentiĝo de landaj kaj fakaj asocioj. Ĉu, unuflanke, la relative malgrandaj asocioj delegu pli da komitatanoj ol ĝis nun kaj, aliflanke, la relative grandaj asocioj kontentigu per neproporcia nombro da komitatanoj? Oni pledas por tia sistemo dirante, ke ankaŭ asocio kun ekz. 50 membroj devas havi eblecon kundecidi en UEA kaj, ke, por la evoluo de la tuto, ne plu tiom gravas ĉu iu asocio havas 3 000 aŭ 5 000 membrojn. En sia antaŭprojekto, la Komisiono sugestas jenan skemon: 100 membroj — 1 komitatano A, 500 — 2, 2 000 — 3, 5 000 — 4, 10 000 — 5. Krome, aperas ankaŭ jena ideo: Kial konservi la strangetan kategorion de "observantoj" (nevoĉdonrajtaj!) en la Komitato kaj kial ne krei statutan eblecon de **koalicio** inter asocioj, el kiuj ĉiu unuopa estas tro malgranda por elekti propran komitatanon A? Por substreki la tendencon de profesia aplikado de la Internacia Lingvo, la fakaj asocioj ĝuu saman reprezentiĝon en la Komitato kiel la landaj asocioj.

Certe, ankaŭ la nova statuto konos komitatanojn C, kiuj ligu al la asocia parlamento pliajn homojn, necesajn por la multfaceta aktiveco de UEA. Kiel jam nun, ofte estraranoj aperas el tiu ĉi kategorio, kiu evitas la devon esti aktivulo de landa asocio por povi aktivi en la Estraro de UEA. Cetere, kion opinii pri 4-jara oficperiodo anstataŭ la nuna 3-jara? La Komisiono, krome, ricevis proponon de la nuna prezidanto de UEA, ke la nova statuto precizigu, ke la prezidanto povas esti reelektita nur por unu plia sinsekva oficperiodo.



La kvartalo de la parlamentaj kaj registaraj konstruaĵoj en Hago: Ĉar UEA havas nederlandan juran personecon, necesas, ke ankaŭ la novan statuton de la Asocio aprobu la kompetenta ŝtata instanco de Nederlando.

Pozicio de la junularo en la Asocio

UEA ne estas escepto se temas pri la problemo de rilatoj inter diversaj generacioj. Unuflanke, estus absurda komplikigo de la tuta laboro, se nia junulara sekcio – TEJO – sendependiĝus de UEA, ĉar, almenaŭ teorie, UEA tiam povus aŭ eĉ devus krei sian propran novan junularan sektion aŭ... rifuzi junajn membrojn, dum TEJO adiaŭus 30-jarulojn en senorganizan vakuon. Aliflanke, tamen, TEJO nepre bezonas tre vastan memstarecon por jure valide entrepreni paŝojn ĉe aŭtoritatoj sen respondecigi UEA kaj por, tutsimple, eksperimenti sur diversaj agadkampoj. Tial la komisiona antaŭprojekto proponas, ke TEJO estu traktata principe same kiel LA/FA (do, eventuale kun propra jura personeco) kaj ke: "La decidoj de la UEA-instancoj koncerne junularan agadon devas esti inspiritaj de la principo de vasta libereco por novaj iniciatoj kaj de investado en la junularan movadon."

Ĉu pli da demokratio?

Jam ĉi-supre ni aludis la ne ĝenerale demokratian elementon de voĉdonantaj delegitoj, mem ne nepre demokratie elektitaj. Sed la nuna Statuto enhavas alian eron, kies longan vivon oni malfacile komprenas: Ĉu vere konvenas, ke la prezidanto de la parlamento (Komitato), kiu kontrolas la "registaron" (Estraro), estas samtempe la ĉefo de la kontrolata instanco? Ĉu estas akceptebla, ke ekz. la prezidanto gvidu diskuton, kiu koncernas aŭ kritikas lin mem? Kompreneble ne! Tial la antaŭprojekto sugestas kreon de komitata ĉefkomisiono (ni prefere evitu la konfuzan terminon "Prezidentaro", same kiel la iom nebulan "gvidantaro"), kiu gvidu la komitatajn kunsidojn kaj, eventuale,

eksterkunsidajn voĉdonojn. Estas diskutende ĉu tia ĉefkomisiono, kiu nepre ne fariĝu ia superestraro aŭ ĝenerala bremsilo, funkcii kiel iuspeca arbitracia instanco.

La nuna Statuto enhavas la eblecon de ĝenerala voĉdono. Ĉu en asocio bazita klare sur la principo de reprezentado de la membraro fare de demokratie elektitaj komitatoj referendumo havas ekzistrajton? Ŝajnas, ke ĝi nur komplikigas la decid-proceduron kaj neniom kontribuas al efektiva plidemokratiigo de la gvidado de la Asocio.

Klopodoj atingi koncizecon

La nova statuto – se oni sekvas la sugeston de la Komisiono – estos sufiĉe malpli longa; ĝi celas esti pli klara kaj pli trafa ol la nuna Statuto, interalie, ĉar ĝi ne plu enhavos tiujn – el statutjura vidpunkto – superflujajn menciojn pri kongresoj, biblioteko, revuo kaj aliaj aferoj parte ordigendaj en ampleksega regularo. Delegitoj, ekzemple, fariĝu komisiitoj de la Asocio sen ludi statutan rolon, krom kiel individuaj membroj, kvankam ili pluhavos sian gravan funkcion de ligilo inter la asocia centro kaj la plej diversaj branĉoj lokaj, regionaj kaj fakaj de la Movado.

Uwe Joachim Moritz

NOTO: Se vi kiel leganto de ĉi tiu artikolo kaj kiel membro de UEA havas iun ideon ĝenerale pri la nova statuto kaj speciale pri la ĉi tie skizitaj elementoj, bonvolu laŭeble baldaŭ skribi al la gvidanto de la Komisiono pri Statuto: s-ro Uwe Joachim Moritz, Feldstr. 38, D-519 Stolberg 8, FR Germanio. (Telefona: 49-2402-72336).

La problemo kaj kiamaniere venki ĝin

Kiam la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey R. Tonkin, post la elekto de la nuna Estraro de UEA en Hamburgo, unuafoje alparolis la kongresan publikon, skizante la estontan agadon de UEA, li emfazis, ke "unue, kaj nepre unue" necesos sanigi la financon de la Asocio (v. nian revuon, septembro 1974, p.147). Efektive, la financa problemaro de UEA estis la kerno de ĉiuj ĝisnunaj kunvenoj de la novaj gvidorganoj kaj ĝi estas ankaŭ la ĉeftemo de la tuta enorma korespondado inter la Komitato, Estraro kaj komisionoj, samkiel interne de tiuj organoj. Ĉi-foje ne temas pri simpla konstato, ke la financo de UEA estas en krizo, ne temas pri sensanga barakto kun tiu krizo, sed temas pri vera batalo, pri tuta milito, kiun al la financa problemaro deklaris la nuna Estraro de la Asocio. Kvankam ni, unuflanke, konscias, ke longa artikolo pri la financo ne estas la plej interesa legaĵo, kiun oni povas proponi al la legantaro, aliflanke, ni kredas necesa, ke ĉiu membro de UEA estu bone informita pri ĉi tiu temo.

EL ĈIUJ ASPEKTOJ de la laboro de UEA en la nuna tempo, la financa estas tiu, kiu donas plej grandajn zorgojn. Pro tio, la Estraro de UEA decidis prezenti al la membraro analizon kaj superrigardon de la financa situacio kaj ĝia evoluo en la pasintaj kelkaj jaroj. Pliajn detalojn pri la aktualaj bilanco, spezoj kaj buĝeto oni povas trovi en la Jarlibro 1974, Dua Parto, paĝoj 73 – 86.



Inflacio

Kiam en la jaro 1955 la Centra Oficejo de UEA translokiĝis al Nederlando, tiu lando estis oazo de malmultekosteco en la okcidenta Eŭropo. Tiu situacio poste tute ŝanĝiĝis kaj Nederlando nun apartenas al la plej multekostaj landoj. Ni povas bone ilustru tiun fenomenon per la afrankokostoj, kiuj, kune kun salajroj kaj presado, okupas gravan lokon inter niaj elspezoj. En 1973, ekzemple,

afranko reprezentis dek procentojn de nia tuta elspezo. Nia unua grafikaĵo montras la altiĝon de la poŝta tarifo ekde 1946. Notu speciale la rapidan kreskon ekde 1964.

Deviga minimuma salajro

La salajroj de la oficistoj en la Centra Oficejo de UEA ĉiam estis nealtaj kompare kun la aliaj nederlandaj salajroj. Kiam en la sesdekaj jaroj en Nederlando la ĝenerala ekonomio floris kaj kiam en la jaro 1966 la ŝtato enkondukis devigajn minimumajn salajrojn, la Centra Oficejo de UEA baldaŭ troviĝis en malfacila situacio, ĉar la elspezo pro salajroj formas la plej grandan parton de la elspezo de UEA. Ĉu la enspezo kreskadas jaron post jaro por kovri la altiĝon de salajroj? La plej grava enspezo por UEA estas la kotizoj. La grafikaĵo 2 montras al vi la situacion de la enspezo – en guldenoj – el la kotizoj



en la jaroj 1966 ĝis inkluzive 1973. Sur la sama grafikaĵo estas indikita ankaŭ la menciita kresko de la minimumaj devigaj salajroj. Tiu kombina diagramo klare montras, kiel la devigaj minimumaj salajroj pli multe kreskis ol la enspezo el la kotizoj. Cetere, la enspezo el la kotizoj ne ĉiam kreskis.


Malprofito

Por prilumigi la nunan financon de UEA, ni la elspezoj kovritan de efektivaj regulaj enspezoj, kun la proporcio kovrita el la kapitalo de la Asocio. Oni notu, ke nur en 1971 la elspezoj estis malpli altaj ol la kutimaj regulaj enspezoj. Se oni transformas tiujn proporciojn en procentaĵojn, oni trovas, ke efektive 1969 estis la plej serioze deficitara jaro en nia lastatempa historio. En tiu jaro la deficito atingis 25 procentojn de la elspezoj. (Vidu la grafikaĵon 4).

Nuna financa situacio

Por prilumigi la nunan financon de UEA, ni prenu la bilancon je 1973-12-31, publikigitan sur la paĝoj 76 kaj 77 de la Jarlibro 1974, Dua Parto. Ĝi montras, krom la sumoj en fondaĵoj, kapitalon de 265 682 gld. Tiu kapitalo enhavas – laŭ la artikolo 41 de la Statuto de UEA – la kotizojn pagitajn de la dumvivaj membroj. Ĝi do ne estas libera sed ŝargita per devaj servoj por la dumvivaj membroj. Ioman ekstran rezervon oni povas atendi ĉe la nemoveblaĵo, t.e. la domo de UEA, en la sumo de 134 400 gld., kiun vi trovas en la debeto de la bilanco.

Bilanco je la fino de la jaro 1974 ankoraŭ ne estas preta, sed estas preskaŭ certe, ke ĝi montros grandan malprofiton, malgraŭ la sukcesaj klopodoj de la nova Estraro severe redukti la elspezojn en la finaj monatoj




de la jaro. Tiu deficito, kompreneble, metos plian ŝargon sur la kapitalon de la Asocio.

Koincide kun tiu ĉi granda deficito, okazis nekutime peza investo de niaj rimedoj en eldona aktiveco. La libro *Esperanto en Perspektivo* postulis grandan elspezon. Tiu elspezo en si mem konsistigas saĝan investon, sed ĝi eĉ pli forte limigas la financon flekseblecon de la Asocio en la nuna momento.

Kaŭzoj de malprofito

La malforta financa stato de la Asocio, kaŭzita de pluraj jaroj da intensa agado kaj samtempa rapida inflacio, havas paralelojn en pluraj landaj asocioj, kiuj baraktas kontraŭ similaj problemoj. Ni ne rajtas atendi, ke tiuj problemoj malaperos de si mem. En Nederlando, ekzemple, oni jam anoncis por 1975 novajn altigojn de la poŝta tarifo kaj de la devigaj minimumaj salajroj, kaj – pliaj altigoj certe venos. Estas tamen grave emfazi, ke la inflacio ne estas komplete unuflanka afero: se la kostoj kreskas, kreskas iagrade ankaŭ la salajroj, kaj la kreskantaj kotizoj ne nepre malhelpas, ke niaj membroj restu en la Asocio. Esence estas, ke ni tenu niajn kotizojn kiel eble plej malaltaj kompare kun la altiĝo de kostoj, sed ne ke ni nepre evitu kelkfojan altiĝon de kotizoj aŭ ŝanĝon de niaj membrokategorioj.

Aldone al la inflacio, ekzistas du aliaj kontribuaj faktoroj al la lastatempaj deficitoj. Unue, el pluraj landoj ne eblas transpagi kotizojn pro transpagaj limigoj. Due, en landoj, de kie oni povas libere transpagi kotizojn, la nombro de individuaj membroj ne sufiĉe kreskis. Efektive, komence de 1974 okazis grava malkresko de la membronombro en la kategorioj de individuaj membroj – nia ĉefa fonto de enspezoj. La Estraro jam komencis esplori rimedojn por pli



efika utiligo de financaj rimedoj blokita en landoj kun transpagaj limigoj, kaj ni esperas, ke tio kontribuos al pli sana financa situacio. Sed, estas pli ol evidente, ke la tria kaŭzo de malprofito, nome la nekresko de la membronombro, devas esti forigita kiel eble plej rapide.

Altigi la nombron de la membraro

La Estraro decidis tuj entrepreni tutan aron da klopodoj altigi la nombron de membroj en 1975. Ni organizos konkursojn tiucele, ni alarmos ĉe la perantoj kaj ĉefdelegitoj, kaj ni jam fondis tute novan societon de subtenantoj — la Societon Zamenhof — pri kiu vi povis legi en la februara numero de tiu ĉi revuo.

Sed neniu varba kampanjo povas sukcesi sen la plena subteno kaj kunlaboro de la membraro. Ni devas certigi, ke absolute ĉiu persono, kiu estis membro-abonanto en 1974, aliĝu ree en 1975. Ni devas ankaŭ reakiri ĉiun personon, kiu estis membro en 1973, sed decidis ne aliĝi en 1974. Kaj ni devas intense varbi novajn membrojn.

Kion fari pli?

La Estraro entreprenis paŝojn por malaltigi la elspezojn de la Asocio. En la pasintaj monatoj ni tiel redistribuis la laboron de la Centra Oficejo, ke ni sukcesis malaltigi la nombron de oficistoj je 25 procentoj. Por ŝpari laboron, preskoston kaj afrankon ni ankaŭ decidis eldoni la Jarlibron 1975 nur en unu



La Libroservo de UEA: Multaj membroj ne konscias, ke la vendo de unu glumarko kaj unu dika, valora libro postulas saman kvanton da administra laboro.

volumo. Aliajn drastajn ŝparojn akompanis kelkaj gravaj novaj iniciatoj.

Kvankam la eldono de la 4-monata revuo *La Monda Lingvo-Problemo* kaj ĝiaj ĝisnunaj malprofitoj neniam estis miksitaj kun la ordinaraj en- kaj elspezoj de UEA, tamen, ĉar tiuj malprofitoj de *LMLP* estis daŭre kovrataj el la Propaganda Konto, tio ne povis malrekte ne havi influon al la tuto de la UEA-financo. Por kovri tiajn malprofitojn (tiu de la jaro 1973 sumiĝis 12 400 gld.) la Estraro esperas baldaŭ eltrovi alian fonton. Tamen, la graveco de *LMLP* kiel revuo de plej alta akademia nivelo estas ankoraŭ ne plene komprenata inter niaj membroj kaj inter eksteraj instancoj, ekz. universitatoj. Pro tio ni nun faras varbkampanjon por gajni pli da abonantoj inter bibliotekoj, akademiaj institucioj kaj unuopuloj. Ankaŭ pri tio la membraro povas multe helpi.

Aliaj fontoj

La solvo por la financo de UEA en la nunaj socio kaj situacio ne estas ĉiam altigi la kotizojn, nek ĉiam malgrandigi la laboron kaj sekve ankaŭ la informadon. Tiu solvo povas troviĝi — krom en la altigo de la membronombro — nur en altiro de mono el aliaj fontoj. Tiuj aliaj fontoj verŝajne nur partete troviĝas en la Movado. Tial necesas turni sin al eksteraj fontoj, inter unuopuloj, fondaĵoj, industrio, ŝtataj instancoj. La Estraro de UEA, la Financa Komisiono kaj la landaj asocioj nun preparas vastan kaj intensan financan kampanjon en kaj ekster la Movado. Pliaj detaloj pri tiu kampanjo estos baldaŭ publikigitaj en ĉi tiu revuo, ĉar ni esperas lanĉi la kampanjon post kelkaj monatoj. Ĝi celos ne nur fortigi nian kapitalon sed ankaŭ havigi subvenciojn por specifaj iniciatoj kaj projektoj allogaj al neesperantistaj instancoj. La kampanjo ne limigos siajn horizontojn al UEA, sed enplektos ankaŭ tiujn landajn asociojn, kiuj deziras kunlabori, kaj eventuale ankaŭ fakajn asociojn.

Venki la problemojn

Por UEA — kaj por pluraj landaj asocioj — la financa situacio estis kaj ankoraŭ estas prema. Sed tio, kio samtempe fariĝas ĉiam pli kaj pli prema, estas la lingva problemo en la hodiaŭa mondo. Ĉie kaj ĉiam pli ofte oni legas kaj aŭdas pri ĝi. Necesas do elteni kaj daŭrigi la laboron. Ni venkos ankaŭ niajn nunajn financajn problemojn ĝuste pro tio, ke ni profunde kaj sincere kredas, ke ankaŭ la mondo venkos sian lingvan problemon, kies sola efika solvo povas esti la Internacia Lingvo Esperanto.

La Estraro de UEA:

D-ro Humphrey R. Tonkin, prezidanto

D-ro Werner Bormann, vicprezidanto

Prof. d-ro Carl Stöp-Bowitz, vicprezidanto

E.L.M. Wensing, ĝenerala sekretario

D-ro Pol Denoël, estrarano

D-rino Flora Szabó-Felső, estrarano

Stanisław Świstak, estrarano

E.J. Woessink, estrarano

Premio R. Schwartz

ANTAŬ SUFIĈE LONGA TEMPO, al la adreso de UEA venis donaco de 4 300 guldenoj, kun indiko, ke tiu mono estu uzita por organizi konkurson pri ampleksa proza verko en la Internacia Lingvo. Kaj, kvankam la demando estis plurfoje tuŝita en la estrarkunsidoj de UEA dum la pasinta jaro, nur lastatempe la Estraro sukcesis fintrakti la aferon kaj interkonsenti kun la donacinto, ke la konkurso nomiĝu "Konkurso Raymond Schwartz", omaĝe al la granda verkisto forpasinta antaŭ du jaroj. Kvankam la nova konkurso havos apartan juĝkomisionon, la Estraro de UEA petis la gvidantojn de la Belartaj Konkursoj precizigi la teknikajn detalojn por anonci la novan konkurson. En unu el la sekvantaj numeroj de nia revuo vi trovos la definitivon lanĉon de la "Konkurso Raymond Schwartz".

Premio Luigi Minnaja



OMAĜE al la nobla personeco de s-ro Luigi Minnaja, forpasinta la 27an de januaro 1974 (v. nian revuon, februaro 1974, p.24), la familio Minnaja el Italio decidis fari unu plian malavaran donacon, ĉi-foje rekte por stimuli la Esperantan kulturon. La familio donacis al Instituto Hodler '68 la sumon de

UNU MILIONO DA ITALAJ LIROJ, kun la celo, ke la jara interezo de tiu kapitalo estu uzata por speciala premio en la kadro de la Belartaj Konkursoj sub la nomo "Premio Luigi Minnaja". La Estraro de UEA antaŭ nelonge, interkonsente kun la familio Minnaja kaj la gvidantoj de la Belartaj Konkursoj, sankciis la premion kaj precizigis jenajn detalojn pri ĝi:

La "Premio Luigi Minnaja" rilatas al aparta konkurso por eseoj en la kadro de la proza branĉo de la Belartaj Konkursoj de UEA. La temoj de la eseoj estu lingvaj, literaturaj, historiaj aŭ sociologiaj, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo kaj ĝia uzado. Minimuma longeco de konkursaĵo estu dek tajpitaj paĝoj. Pri la aljuĝo de la premio decidis aparta 3-membra komisiono. La unua konkursperiodo estu de la 1-a de aprilo 1975 ĝis la 31-a de marto 1976, kaj la unua gajninto de la "Premio Luigi Minnaja" estu proklamita dum la 61a Universala Kongreso en 1976, en Ateno.

Belarta jubileo

KUN LA CELO AKCENTI la gravan rolon, kiun en sia 25-jara historio ludis la Belartaj Konkursoj, la Estraro de UEA, per skriba voĉdono, fine de februaro 1975 unuanime akceptis jenan rezolucion:

La Estraro de UEA

1. notas la gravan rolon de la Esperanto-kulturo en la moderna Esperanto-movado, kaj la specialan kontribuon, kiun tiurilate faris tra 25 jaroj la Belartaj Konkursoj de UEA;
2. esprimas sian dankon pro ilia sindona laboro al la retiriĝintaj prezidanto de la juĝkomisiono, prof. Gaston Waringhien, kaj la sekretariino de la Konkursoj, s-ino Emilija Lapenna, kiel ankaŭ al la tuta juĝkomisiono de la ĵus pasinta periodo (W. Auld, R. Bernard, C. Conterno, J.H. Rosbach, I. Rotkvić, A. Venture);
3. bonvenigas la novajn prezidanton de la juĝkomisiono, s-ro Baldur Ragnarsson, la sekretario, s-ro Alec Venture, kaj la juĝkomisionon;
4. kaj deklaras la jaron 1975 — **Jubilea Jaro de la Belartaj Konkursoj**, evento festota dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, 26a de julio — 2a de aŭgusto 1975.

FOTO 75

EN LA DECEMBRA NUMERO de nia revuo (p.206) jam estas anoncite, ke la Belartaj Konkursoj 1975 ampleksos ankaŭ la branĉon FOTOGRAFIO. Intertempe estas konataj ankaŭ la aliaj detaloj, kiuj koncernas la konkursaĵojn en tiu branĉo.

Laŭ la Regularo pri la Belartaj Konkursoj, kiu validas ankaŭ por ĉi tiu branĉo, konkursi povas ĉiuj individuaj membroj de UEA aŭ aliĝintoj al la 60a Universala Kongreso de Esperanto. La fotografaĵoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj **de minimuma formato 13x18cm**. Ĉiujn konkursaĵojn por la branĉo FOTOGRAFIO oni sendu rekte al la adreso: La 60a Universala Kongreso de Esperanto, Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando, kun grandlitera indiko sur la koverto "Foto-Konkurso". **La limdato** por la alsendo de la konkursaĵoj estas **la 1-a de julio 1975**.

Dum la 60a UK estos organizita aparta ekspozicio de la foto-konkursaĵoj. Pri la premioj (100, 70 kaj 40 ned. guldenoj) voĉdonos la vizitantoj de la ekspozicio kaj juĝkomisiono, kiun gvidos s-ro Torben Kehlet, foto-industriisto el Kopenhago.

Lingva egalrajteco fariĝis aĉetebla varo

LA 18-AN DE DECEMBRO 1974, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, laŭ rekomendo de siaj Kvina Komitato kaj Konsulta Komitato pri Administraj kaj Buĝetaj Demandoj, akceptis rezolucion, laŭ kiu, ekde la 1-a de julio 1975, oficialaj dokumentoj de la Ĝenerala Asembleo, la Sekurec-Konsilantaro kaj la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro estos regule tradukataj ankaŭ en la germanan lingvon. Ĉi tiun rezolucion komune iniciatis la registaroj de Aŭstrio, Federacia Respubliko Germanio kaj Germana Demokratia Respubliko, kiuj transprenis la devon starigi apartan fondaĵon el kiu oni kovros ĉiujn kostojn, kiujn kaŭzos la apliko de la rezolucio.

Aliflanke, dum la 18a Ĝenerala Konferenco de Unesko, en aŭtuno pasintjare en Parizo, estas akceptitaj pliaj rezolucioj, laŭ kiuj la araba estonte ĝuos la samajn avantaĝojn, kiujn jam ĝuas la aliaj laboraj lingvoj de Unesko. Kompreneble, la iniciato por ĉi tiuj rezolucioj venis el la arabaj landoj. En la nuna tempo estas sufiĉe kompreneble, ke la akcepton de tiuj rezolucioj ne malhelpis atentigo de la ĝenerala direktoro de Unesko, ke tia trakto de la araba signifas plialtigon de la proponita buĝeto por 1975/76 por pliaj 2 230 000 usonaj dolaroj. Laŭ financaj fakuloj de Unesko, ĉi tiu sumo estas necesa por kovri la kostojn de la produkto en la araba de ĉ.

16 000 paĝoj da labordokumentoj de diversaj Unesko-organoj kaj de multnombraj internaciaj konferencoj, kiujn Unesko aranĝos en tiu buĝeta periodo. Cetere, dum la 18a Ĝenerala Konferenco estas akceptitaj ankaŭ aliaj rezolucioj, kiuj al la araba lingvo donas pli elstaran pozicion ankaŭ en diversaj projektoj kaj programoj de la monda organizaĵo por edukado, kulturo kaj scienco. Siavice, ankaŭ tiuj aliaj rezolucioj ŝargas la buĝeton de Unesko per pliaj centoj da miloj da dolaroj.

Sed, la nafto-riĉaj arabaj landoj kaj la alte industriaj germane parolantaj landoj havas sufiĉan monon por aĉeti la lingvan egalrajtecon en la mondaj organizaĵoj.

Baldaŭ, eble eĉ tre baldaŭ, ankaŭ Japanio aĉetos la egalrajtecon de la japana, kaj, se la aferoj evoluos laŭ la nunaj tendencoj, post nelonge, en Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj mondaj organizaĵoj ankaŭ la persa lingvo enkondukiĝos kiel oficiala kaj labora lingvo, ĉar Irano ja havas sufiĉan monon por tion pagi.

Aliflanke, se la mondaj organizaĵoj kaj konferencoj baldaŭ ne donos la saman privilegiitan pozicion al la portugala lingvo, la funkciuloj de tiuj organizaĵoj kaj la delegitoj en tiuj konferencoj devos rezigni pri la kaŝtrinkado en la paŭzoj, ĉar Brazilo kondiĉigos

sian kafeksperton per pli bona internacia pozicio de sia nacia komunikilo. Feliĉe, ke la naciaj lingvoj de la ĉefaj sukerproduktantoj jam estas oficialaj kaj laboraj lingvoj en la mondaj organizaĵoj, alie, laŭ kelkaj lastatempaj novaĵoj, oni devus elekti inter sensukeraj kukoj kaj sukerprezo, kiu al la landoj-produktantoj ebligus aĉeti la dolĉon de sia lingva egalrajteco.

Ĉiukze, ŝajnas, ke la mondo baldaŭ kun certeco lernos la lingvojn de la landoj kiuj produktas kupron, baŭksiton, feron kaj oron; unuiĝos lingvo-preme eble ankaŭ la banan-produktantoj.

Tamen, ni starigu ankaŭ kelkajn alispecajn demandojn. Kiam la landoj, kiuj produktas nesufiĉan kvanton da rizo por nutri siajn popolojn, kiam tiuj landoj kapablos aĉeti sian lingvan egalrajtecon en la mondaj organizaĵoj kaj en la internaciaj rilatoj? Kiam la lingvoj de Hinda Unio, Pakistano kaj Bangladeŝo komencos egalrajte roli en la mondaj organizaĵoj? Kiam oni en Unuiĝintaj Nacioj komencos interpreti en la svahila, malaja, amhara, lingala, indonezia, kiam cetere ankaŭ en la hungara, sveda, pola, itala, dana, slovena, nederlanda, albana, . . . ?

Unuiĝintaj Nacioj antaŭ kelka tempo formis apartan komitaton, kies tasko estas proponi reorganizon de la monda organizaĵo. Temas fakte pri politika reorganizo, eble pri gravaj ŝanĝoj en la organiza strukturo de la nuna internacia forumo, kiu ofte montriĝas neefika kaj troe burokratiginta. Estas malfacile kredi, ke tiu komitato funde okupiĝos ankaŭ pri la lingva dimensio de la problemaro. Eble la funkciuloj de ĉi tiu kaj aliaj mondaj organizaĵoj konscie evitas okupiĝi pri la lingvaj egalrajteco kaj diskriminacio ĝuste pro tio, ke ili siajn funkciojn en la burokrata aparato de la organizaĵoj ofte ŝuldas precize al tiuj lingvaj kaoso kaj protektismo. Oni do ne povas atendi, ke la membroj de tiu komitato venos al konkludoj, kiuj estas rekte kontraŭaj al ilia propra persona aŭ nacia intereso. Cetere, la rilato al la lingva demando dependas de la maniero en kiu la membroj de tiu plia komitato de UN traktos aliajn demandojn de la hodiaŭa mondo, elinter kiuj estas malfacile izole trakti nur kaj ĝuste la lingvan problemon. Nur se oni funde reorganigos la mondan organizaĵon, sole se oni rezignos pri hipokrita rilato en la traktado de la mondaj brulproblemoj, - nur en tia kazo oni povas atendi pli sobran kaj pli honestan rilaton ankaŭ la la problemoj de la lingva kaj kultura egalrajtecoj. Estas iluzio kaj utopiismo atendi, ke oni unue solvos la lingvan problemon, kaj nur poste tiun de la malsatanta miliardo.

sm

Brusela batalo

EN LA KOMUNUMA DOMO de Schaarbeek, apartanta al la (dulingva) ĉefurbo de Belgio, Bruselo, troviĝas pluraj informgiĉetoj por franclingvanoj kaj nur unu por nederlandlingvanoj. Kontraŭ tiu ĉi situacio, cetere — kontraŭleĝa, en decembro 1974 protestis plurcento da membroj de Taal-Aktie Komitee (lingva agad-komitato), kiu batalas por la lingva egalrajteco en Belgio. La protestantojn atendis grupo de franclingvanoj, kiuj estis armitaj per plumbaj kugloj, brikoj, ovoĵoj kaj inksaketoj. Ĉi tiujn "armilojn" senpage distribuis la "kultura domo" de la komunumo Schaarbeek. Veraj bataloj ne okazis dank' al la polico, kiu faris densan hommuron inter la du partioj. Dum posta intervjuo, s-ro Nols, la komunumestro, deklaris, ke li ne intencas iam apliki aŭ aplikigi leĝojn, kiuj celas doni la samajn rajtojn al la parolantoj de la nederlanda lingvo en Bruselo.

Eŭropa pasporto

DUM LA KONFERENCO de la ĉefministroj de la landoj de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, en decembro 1974 en Parizo, unu el la faritaj decidoj rilatis al enkonduko de komuna pasporto por la 9 ŝtatoj-membroj de EEK. La decido antaŭvidas starigon de aparta laborgrupo, kiu studos eblecojn de pasporta unio, tiel anticipante enkondukon de komuna pasporto. Ĉi-rilata projekto devus esti prezentita al la registaroj de la 9 ŝtatoj-membroj de EEK antaŭ la fino de 1976. La projekto devas antaŭvidi laŭgradan unuecigon de la leĝaro pri eksterlandanoj kaj abolon de la pasporta kontrolo interne de la Komunaĵo. Kiel nun statas la aferoj — almenaŭ sur la lingva kampo — eventuala komuna pasporto de la EEK-landoj devus havi tekston en ĉiuj 6 oficialaj lingvoj de la Komunaĵo. Ĉu la landaj asocioj de UEA en la landoj de EEK aŭ eble la Eŭropa Esperanto-Centro sukcesos almenaŭ atentigi la "bruselajn eŭrokratojn" pri la ekzisto kaj praktika utilo de la Internacia Lingvo?

Eksperimento en Nov-Zelando

POST la oficiala Esperanto-kurso por instruistoj, kiun subtenis la ministerio pri edukado (v. nian revuon, novembro 1974, p.197), nun komenciĝis ankaŭ la eksperimenta instruado en kelkaj novzelandaj mezlernejoj. Temas pri kvin lernejoj en kiuj kvin instruistoj instruas Esperanton al ok klasoj de 11 — 13-jaraj gelernantoj. La instrutempo varias de 60 ĝis 120 minutoj ĉiusemajne, dividita en 2 ĝis 5 lecionoj. Pri

la eksperimento, kiu daŭros de februaro ĝis novembro ĉi-jare, jam esprimis favorajn opiniojn pluraj regionaj edukinspektoroj. La eduka ministerio helpis en la presigo de la instruprogramego kaj aliaj materialoj. En la kadro de la eksperimento oni planas ekzameni la lernantojn trifoje, interalie por montri la efikon de la lernado de Esperanto al la progreso en aliaj studobjektoj. Krome, ekster la kadro de la eksperimento, nuntempe en Nov-Zelando Esperanton lernas ankaŭ pliaj centoj da lernantoj. La novzelandaj organizaĵoj de Esperantaj instruistoj bonvenigas proponojn pri internacia interklasa korespondado, pri kio bv. skribi al: NZAET, Box 330, Wellington, Nov-Zelando.

Reklamado

LA TURISMA KOMISIONO de Hungara Esperanto-Asocio (Poŝtkesto 2, H-7601 Pécs) eldonis apartan broŝuron *Hungarlando invitas vin por 1975*, per kiu oni reklamas ses el la multaj ĉi-jaraj Esperanto-aranĝoj en tiu lando. Similan aktivecon en la reklamado de siaj estontaj aranĝoj oni rimarkas ankaŭ ĉe la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA (Poŝtkesto 153, H-1443 Budapest), kiu komence de la jaro eldonis plurajn reklamilojn kaj kalendarojn. Ĉiuj ĉi eldonaĵoj estas bone prizorgitaj kaj belaspektaj.

Bona programo

RIGA ESPERANTO-KLUBO, kiu funkcias en la ĉefurbo de la soveta respubliko Latvio, aktivas en la kadro de la respublika kulturdomo de edukaj kaj sciencaj laborantoj. Al la klubo apartenas ankaŭ du junularaj kaj blindula sekcioj. Regulajn semajnajn kunvenojn de la klubo ĉiam ĉeestas plurdeko da aktivuloj. La programoj de la kunvenoj estas bone antaŭplanataj kaj dum la lastaj jaroj ili kutime aperas en presita formo por la tuta laborsezono de septembro ĝis julio. Inter la plej interesaj eroj en la aktuala programo troviĝas ankaŭ aparta ciklo de aranĝoj sub komuna nomo "Latva literaturo en Esperanto", en kies realigo partoprenas ankaŭ la renoma latva aktorino Alma Abele kaj Esperanta poetino Elvira Lippe. En oktobro pasintjare, en la klubo okazis aparta vespero dediĉita al la verkoj de Baghy kaj Kalocsay. Tre popularaj estas ankaŭ la programoj, kiuj prezentas unuopajn landojn (Bulgario, Usono, Jugoslavio, FR Germanio, beneluksaj landoj ktp.). Krome, en la urba fremdlingva biblioteko, kiu havas ankaŭ Esperanto-fakon, dum la pasinta jaro okazis 8 prelegoj por la ĝenerala publiko — pri Esperantaj temoj. En tiu ĉi lerneja jaro, la Internacia Lingvo estas nedevige instruata en ses rigaj mezlernejoj, kaj okazas ankaŭ eksterlernejaj kursoj. Samtiel notindas, ke la naci-lingva gazetaro regule raportas pri la aktiveco de la klubo en Riga.


LA LIBROMERKATO:

Pleje vendataj libroj en 1974


LA LIBROSERVO DE UEA ankaŭ en la jaro 1974 notis rimarkindan kreskon de siaj spezoj. Dum tiu jaro ĝi vendis librojn, gramofondiskojn ktp. por sumo de pli ol 117 000 guldenoj, kompare kun la vendoj por 93 500 en la jaro 1973. Kompreneble, al tiu ĉi 25-procenta kresko iom kontribuis ankaŭ la inflacio, ĉar temas precipe pri la vendado de novaj libroj, kies prezoj formiĝis konsiderante la inflaciajn tendencojn. Sed tamen, eĉ kun tiaj konsideroj, la kresko de la vendoj estas atentinda kaj ĝojiga montrilo pri kresko de ĝenerala intereso pri la Esperanta literaturo, kio, aliflanke, atestas pri ia vekiĝa etoso en la tuta Movado. Kiel sciante, nia statistiko baziĝas ekskluzive sur unuopaj vendoj, kaj ĝin ne eniras la aĉetoj, kiujn ĉe la Libroservo de UEA faris la aliaj libroservoj kaj revendistoj. Tial, almenaŭ kiam temas pri la propraj eldonaĵoj de UEA, la statistiko estas erariga, kvankam ĝi estus ne malpli erariga se ni enkalkulus ankaŭ grandkvantajn mendojn, kio subite venigus ĉiujn UEA-eldonaĵojn en la unuajn lokojn. Krome, dum la pasintaj jaroj, ni kutime raportis aparte pri la plej sukcesaj eldonaĵoj en unuopaj literaturaj branĉoj, kion ni ĉi-foje ne faras klopodante ĉi tiel atingi plian gradon de objektiveco.

Jen do la listo de la pleje vendataj libroj en 1974:

1.	<i>Internacia komerca-ekonomika vortaro</i> (F. Munniksma k.a.)	gld. 57,50
2.	<i>Amuzaj dialogoj</i> (A. Lienhardt)	4,50
3.	<i>Kun siaspeca spico</i> (R. Schwartz)	11,40
4.	<i>Ni kaj ĝi</i> (G. Waringhien)	16,80
5.	<i>Esperanto en perspektivo</i> (I. Lapenna, U. Lins kaj T. Carlevaro)	84,00
6.	<i>Por pli efika informado</i> (I. Lapenna)	2,25
7.	<i>Internacia Ekzameno, specim. dem.</i>	1,73
8.	<i>Plena ilustrita vortaro</i> (G. Waringhien)	87,00
9.	<i>Kompleta lernolibro</i> (L. Mimó)	17,70
10.	<i>La Sankta Biblio</i>	10,80
11.	<i>Komputilteknika vortaro</i> (Siklaky kaj Rezső)	19,20
12.	<i>Antologio de amoro</i>	3,60
13.	<i>Ĉu vi parolas tendare?</i> (Corsetti kaj La Torre)	2,50
14.	<i>Esperanto 1</i> (Szerdahelyi)	6,00



English	International business dictionary in 9 languages
Esperanto	Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj
Deutsch	Internationales Wörterbuch für Handel und Wirtschaft
Español	Diccionario internacional de comercio y economía
Français	Dictionnaire international du commerce et de l'économie
Italiano	Dizionario internazionale per il commercio e per l'economia
Nederlands	Internationaal woordenboek voor handel en economie
Português	Dicionário internacional de comércio e economia
Svensk	Internationellt ordbok för handel och ekonomi



15.	<i>Zamenhof, aŭtoro de Esperanto</i> (Boulton)	10,20
16.	<i>Concise dictionary of 26 languages</i>	6,30
17.	<i>Palaco de danĝero</i> (M. Wagnalls)	2,40
18.	<i>Sklavoj de Dio</i> (G. Gárdonyi)	10,50
19.	<i>ABZ de amo</i> (I. kaj S. Hegeler)	33,78
20.	<i>Retoriko</i> (I. Lapenna)	25,00

La plej multe vendataj gramofondiskoj en 1974 estis:

1.	<i>Nikolaj Rytjkov – Elektitaj eroj</i>	15,00
2.	<i>Internacia elparolo</i>	1,70
3.	<i>Univox-kursoj</i>	13,20
4.	<i>La Espero</i> (japana eldono)	1,20
5.	<i>La voĉo de K. Kalocsay</i>	2,40

La supraj listoj, precipe tiu pri la plej vendataj libroj, donas materialon por interesaj konstatoj kaj bazon por gravaj konkludoj. Antaŭ ĉio, necesas emfazi, ke verŝajne unufoje sur la pinto de la listo troviĝas faka terminaro, kiu en malpli ol unu jaro sukcesis elĉerpiĝi ĉe la eldoninto kaj estas nun havebla nur ĉe kelkaj revendistoj (inkluzive de la Libroservo de UEA). Ĉu la venko de *Internacia komerca-ekonomika vortaro* signifas, ke la esperantistaro ŝanĝas sian intereson, des pli, ke inter la unuaj 20 pleje vendataj libroj troviĝas eĉ ne unu poezia volumo? Kvankam aperinta nur en la lastaj semajnoj de 1974, *Esperanto en perspektivo* sukcesis okupi la kvinan lokon. Fakte, se la Libroservo estus havinta sufiĉe da disponeblaj ekzempleroj por en la jarfinaj tagoj kontentigi ĉiujn mendojn de *Esperanto en perspektivo*, tiu libreto nun okupus eĉ pli elstaran lokon en nia listo. Ĉiukaze, estas eĉ iom kurioze, ke tiu libro entute sukcesis eniri la liston por 1974, ĉar jam nun estas evidente, ke la jaro 1975 estos la jaro de *Esperanto en perspektivo*. Antaŭ ol lasi la pluan analizon de la listo al niaj legantoj, ni ankoraŭ atentigu, ke la listo klare montras, ke oni interesiĝas, kompreneble, ĉefe pri novaj eldonaĵoj kaj, ke la alteco de la prezo ne ludas esencan rolon en la decidiĝo pri aĉeto aŭ neaĉeto.

En la februara numero de nia revuo (3a kovrilpaĝo) vi rimarkis la anoncon "Librohelpo". Estas bedaŭrinde, ke la Libroservo de UEA pro la nuna financa stato de la Asocio devis decidiĝi al tia paŝo, kiu certe influos ankaŭ nian venontjaran liston de la pleje vendataj libroj. Tamen, la enkonduko de la minimuma mendosumo ĉe la Libroservo de UEA ne devus negative influi la libromerkaton en la Movado, ĉar tio grave malŝarĝas la Centran Oficejon kaj samtempe celas laborigi (do ankaŭ profitigi) la landajn libroservojn.

Sciencigo de sciencistoj

EN LA ARTIKOLO "Ili nepre komprenos vin" (*Esperanto*, novembro 1974, p.192-193), evidentas nerealisma kontraŭscienca sinteno, aparte ŝoka kiam oni konsideras ties fonton. La tuto reliefigas profundan miskomprenon de la rolo de Esperanto — sendependa lingvo kun sia propra strukturo, postulanta seriozan studon, memstara kaj distinginda disde ĉiu alia lingvo.

La malnovaj argumentoj de "tuja komprenebleco" de Esperanto al iu teorie ekzistanta "klara homo" estas inter la nesciencaj asertoj, kiuj pleje ridindigas nian aferon en la okuloj de lingvistoj, pedagogoj ktp. Ili riskas egaligi la memstaran, memevoluantan lingvon Esperanto al iu novlatina planlingva projekto, kiu eble jes estas komprenebla, en skriba formo kaj pri limigita temaro, al edukita parolanto de latinida lingvo. (Tiaj asertoj, kompreneble, pravigas la pli seriozan aserton, ke tiuj projektoj estas nur okcident-eŭropa afero). Sed la romantika anekdoto pri "nepre komprenebleco" aludas ja al voĉa prelego en Esperanto, en la sfero de matematiko, kie alte nuan-cita, preciza Esperanta vortostoko jam ekzistas, kaj al konferenco balkanlanda, kies delegitoj estas parolantoj de finn-ugra, slavaj, latinida, greka kaj aliaj lingvoj. Kiel la artikolo de Dolapĉiev/Atanasov indikas, necesas plie enkonduki Esperanton en internaciajn sciencajn kongresojn. Sed la sinteno, ke la kongresanoj "nepre komprenos vin" kondukas vole-nevole al la konkludo, ke ne necesas instrui la lingvon, ne necesas vortaroj, terminaroj, traduklaboro, oficialigo. Ĉio estas kvazaŭ magia, senplana, aŭtomata. Pli malscienca oni ne povas esti.

La ideo, ke oni povas venkigi nian aferon per foja ruza, surpriza, neanoncita enŝteligo de esperantlingva programero en iun aranĝon, estas bagatela. Necesas aparta, celkonscia lingvopolitika agado. Kaj evidente necesas sciencigo de la agado de niaj sciencistoj.

Prof. d-ro Richard E. Wood, Usono

Nekomprenataj vidvinoj

MI RIMARKAS, ke afableco kaj delikateco de sentoj vere ne estas la karakterizo de la nuna enhavo de *Esperanto* (vidu ankaŭ "La nekomprenemaj vidvinoj" — januara numero, p.5 — al kiu oni povas respondi per alia artikolo sub la titolo "Nekomprenataj vidvinoj").

C. Minio-Paluello Minnaja, Italio

Ekspluatado de Esperanto

EN VIA REVUO preskaŭ neniam aperas raportoj pri aferoj ekster la Esperantaj kulturaj kaj amikaj rondoj, kie Esperanto rolas kiel utila ilo, kiu gajnas sian viv-

rajton per profitdona laboro. Mi skribas nun por sugesti, ke via revuo instigu al tia "ekspluatado" de Esperanto, ekz. per konstanta rubriko "Esperanto funkcia". Mia opinio, tiu rubriko ne devus nur raportoj, sed ankaŭ instigi, stimuli, sugesti.

Michael Falla, Britio

Ĉiam restas la popolo

MI PLENE SUBTENAS la novelektitan Estraron de UEA, ĝiajn penojn demokratigi la gvidadon de la Asocio, sanigi la fincan staton kaj vigligi la Movadon surbaze de la aktiva neŭtraleco. Mi plene subtenas la opinion de la redakcio kaj opinion de aliaj aŭtoroj, kies artikoloj aperis en la novembra numero de la revuo. Mi ege bedaŭras, ke kelke da elstaraj esperantistoj forlasis la Movadon opiniante sin neanstataŭeblaj. Nia soveta proverbo diras: "Gvidantoj venas kaj foriras, sed ĉiam restas la popolo". Same estas en la Esperanto-movado.

P. Poliŝĉuk, Sovet-Unio

Pri la lastaj numeroj

La lastaj numeroj de *Esperanto* estas tre interesaj enhave kaj grafike. Gratulon!

Marinko Gjivoje, Jugoslavio

"Suĉulo" anstataŭ "bebo"

Ĉu ankaŭ en la Esperanta mondo regas iomete la angla malsano, kiu terure atakas la nederlandan lingvon? Oni povas legi "teamo", "handikapito", "hobio". Mi proponas anstataŭ tiuj anglismoj uzi la vortojn: laborgrupo, difektulo kaj ŝatokupo, kaj anstataŭ "bebo" (angle *baby*) — suĉulo.

Jaap Rooke, Nederlando

Pli modernaj ideoj

Ĉiam estis mia opinio, ke personoj pli ol 60-jaraj devas lasi la gvidadon al pli junaj batalantoj, ĉar junuloj ĉiam havis kaj havos aliajn kaj pli modernajn ideojn ĉiurilate.

L. Brieger, Brazilo

Mi preskaŭ nuligis la abonon

Mi volas gratuli vin pro la nova aspekto de *Esperanto* ekde la januara numero. Ĝi estas pli facile legebla pro la interkolumnaj linioj. Ĉar la nova aspekto ŝparas ankaŭ monon, la afero estas des pli gratulinda. Mi volas esprimi ankaŭ dankon pro la pli granda interese de la revuo. Antaŭ 12 monatoj, mi preskaŭ nuligis la abonon, sed hodiaŭ mi sendas la kotizon kun vigla antaŭĝuo.

E.R. Penny, Britujo

Skandalo por kultura movado

Mi ŝatus esprimi mian malkontenton pri la ĵurnalisma nivelo de la revuo *Esperanto* dum la pasinta duonjaro. Ĝi estas skandalo por kultura movado kia pretendas esti la nia.

Christian Lauridsen, Danlando

Ĝi estas tolerebla

Mi kun granda intereso tralegis la ĵus ricevitan janu-aran numeron de la revuo. La nova paĝaranĝo eble estas moderna, tamen ne tro bonimpresa. Nu, finfine, ĝi estas tolerebla.

Boris Kolker, Sovet-Unio

La kuraĝa decido de belgoj

KIEL FAKULO, mi senrezerve aprobas vian decidon ne plu zorgi pri la dekstra margeno en la kompostado. Retajpado kostas kaj, krome, kvankam estas dubinde, ke tio donas al la revuo pli modernan aspekton, vere kelkaj paĝoj nun pli belas: komparu ekz. p.180 en la oktobra numero kun la paĝo 18 en la januara..... La kuraĝa decido de belgoj rilate la revuon estas laŭ mi imitinda..... Ni fakte bezonas belan kaj imponan internacian revuon, riĉan je informoj kaj novaĵoj, respegulantan la vivon de la monda esperantistaro. Tiamaniere la landaj asocioj havos pli da tempo por zorge flegi la Esperanto-revuojn en siaj naciaj lingvoj.

Aldo Viotto, Italio

Kalendara avareco

Kiamaniere oni povas esti ĝustatempe informita pri la venontaj Esperanto-aranĝoj? Kelkaj junuloj, leginte vian kalendaron, plurfoje deziris partopreni en anoncita renkontiĝo, sed ĉiam estis malfacile trovi la organizanton ĝustatempe. Ĉu via gazeto povus esti malpli avara je informoj tiurilate?

Giorgio Bronzetti, Italio

Nacilingvaj antologioj de Esperanta literaturo

La legantoj de *Esperanto* estas informitaj el la artikolo de prof. d-ro R. E. Wood (februara numero 1974, p. 26–27), ke oni laboradas pri la plej konvena kunmeto de Esperantlingva antologio de la usona literaturo de la 20a jarcento. Ŝajnas al mi, ke eĉ multe pli grava tasko estus elekti verkojn el la originala Esperanta literaturo por kompili nacilingvajn antologiojn de la Esperanta literaturo.

D-ro Ottó Haszpra, Hungario

Pledo por plia grado de internacieco

Mi ĉiam ĝuas ricevi la revuon kaj legas ĝin kun granda intereso. Sed malferminte la januaran numeron, sur la dua kovrila paĝo sub "La kovrilo", kaptis mia okulo la jenan frazon: "La sereneco de la rideto. . . ne nur por la jarŝanĝaj festotagoj. . .". Mi komprenas, ke durante "jarŝanĝaj festotagoj" vi celas al la festotagoj, kiujn festas ĉie en la mondo la kristanoj (kaj ankaŭ nekristanoj vivantaj en Eŭropo).

Sed, feliĉe, en la Esperanto-movado, kiu estas internacia kaj neŭtrala, estas ne nur kristanoj kaj eŭropanoj. Estas ankaŭ budhanoj, mahometanoj, ĉinoj, oomotanoj, judoj k.a. en ĝi. Tiuj ĉi esperantistoj, vivantaj en diversaj mondpartoj, ne festas la jarŝanĝajn festotagojn en la unua tago de januaro. Ili havas siajn proprareligiajn aŭ propranaciajn jarŝanĝajn festotagojn, ĉar ili havas siajn proprajn kalendarojn. Ekzemple, mi festis la jarŝanĝan festotagon lastfoje la 17an de septembro 1974, ĉar en tiu dato finiĝis la lasta monato ("Elul") de la jaro 5735 laŭ la juda kalendaro.

Por mi la lasta tago de la jaro 1974 signifis ne "festotagon", kiel vi skribis en *Esperanto*, sed simple nur jarŝanĝan tagon el vidpunkto komerca, financa k.s. Mi esperas, ke malgraŭ la fakto, ke la redaktoro de la revuo vivas en Eŭropo, li estontece sukcesos pli bone adapti la revuon al la opinioj kaj principoj de ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo.

Josef Šemer, Israelo

Mi ĝis nun publikigis 256 tradukojn. . .

Kun kelka surprizo mi legis sur p.191 de *Esperanto en Perspektivo*: ". . . multaj talentaj aŭtoroj preferas sin elprovi traduke antaŭ ol verki originale, aŭ de tempo al tempo dediĉi sian lerton al la tradukado. Ne ĉiuj: W. Auld, G. Mattos, E. de Kock, M. Boulton, J. Baghy, R. Schwartz neniam tradukis, aŭ nur hazarde kaj pro momenta neceso."

Kiom koncernas min, mi ĝis nun publikigis 256 tradukojn, el kiuj ne malmultaj estas ampleksaj. Certe tio ne rezultiĝis el hazardo aŭ momenta neceso! Mi volas diri, ke la supra citaĵo donas tute malĝustan impreson pri mia sinteno al la tradukado, kaj mi bedaŭrus, se tia impresado disvastiĝus — tiom pli, ĉar mi estas sufiĉe fiero pri mia traduklaboro!

William Auld, Skotlando

Kiam oni skribas ...

KVANKAM la rubriko "Leterkesto" forestis el la revuo pli-malpli unu tutan jaron, ŝajnas, ke tio ne mal-kuraĝigis niajn legantojn, kies leteroj lastatempe komencas svari. Al tio ŝuldiĝas la abundeco de la ĉi-foja rubriko kun 15 leteroj. Kompreneble, ankaŭ estonte ni volonte publikigos opiniojn de legantoj, kvankam necesas kompreni, ke pro diversaj kialoj ne eblas publikigi ĉiujn opiniojn.

Kiam oni skribas al la redakcio, oni memoru, ke ni ne aparte interesiĝas pri laŭdaj leteroj. Oni prefere kritiku la enhavon kaj la aspekton de la revuo. Oni bv. argumenti siajn opiniojn, ŝparante tiel tempon al la redakcio, kiu alie devus mem elserĉi faktojn pri la traktata demando. Se oni mem ne estas konciza, oni kun certeco atendu niaflankan koncizigon. Ni ne povas multe korespondi, sed bv. noti, ke aperigo de letero jam estas respondo, kio estas ankaŭ la neaperigo de kontribuaĵo proponita por la rubriko.

La kvin libroj de Kawamura

Recenzas T. Sakuma kaj K.F. Price (Kanado):

Fundamentaj konceptoj en kemio, de S. Kawamura. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj (SUK), 1974. 78p. 29cm. Ofsetita manuskripto.

Enkonduko en organikan kaj biologian kemion, de S. Kawamura. Lieĝo: SUK, 1974. 89p. 29cm.

Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj, de S. Kawamura. Lieĝo: SUK, 1974. 47p. 29cm.

Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinaj, de S. Kawamura. Lieĝo: SUK, 1974. 91p. 29cm.

Informado kaj dokumentado pri kemio, de S. Kawamura. Lieĝo: SUK, 1974. 43p. 29cm.

La aŭtoro, jam bone konata en ISAE, verkis serion de interesaj libroj por la pasintjaraj Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo. La libroj bone kovras bazajn temojn en kemio, speciale en biologia kemio, por laikoj, kiuj akiris fundamentajn sciojn pri kemio, biologio, fiziko kaj matematiko en mezgrada lernejo.

Uzante minimume da matematikaj formuloj, la unua libro koncize kaj ortodokse traktas ĝeneralajn temojn, kiujn universitataj studentoj devas lerni en la komenco. Pro la manko de tempo en SUK, la aŭtoro intence preterlasis kelkajn gravajn fenomenojn ĉefe en la fizika kemio.

La dua libro sisteme prezentas ĝeneralajn objektojn en la organika kemio kaj biokemio. Ĉar la libro celas enkonduki laikojn, la aŭtoro evitis diskutojn pri iomete malfacilaj temoj, ekz., reakciaj mekanismoj, spektroskopio (NMR, ESR, MS, IR, UV, Iks-radia), kromatografio kaj aliaj instrumentaj analizmetodoj, kiuj estas esencaj al fakaj studentoj por kompreni strukturojn de molekuloj.

La tria libro, kun riĉa bibliografio, prezentas diversajn aspektojn de karbonhidratoj, kiuj estas unu el la kvin esencaj nutraĵoj por la homaro. La libro klarigas pri nomenklatur, historio de studoj en tiu ĉi kampo, stereoizomerismo, monosakaridoj, oligosakaridoj, polisakaridoj, fotosintezo, metabolismo de glukozo, glukozo-ses-fosfato kaj aliaj rilataj kombinaĵoj. Kvankam restas ankoraŭ neklaraj aŭ nesolvitaj punktoj, la aŭtoro per la uzo de multaj skizoj klopodis ekspliki malfacilajn fenomenojn de la fotosintezo kaj metabolismaj cikloj. Notindaj estas abundaj raportoj de la aŭtoro pri sojaj karbonhidratoj: kelkaj el ili estis originale verkitaj en la Internacia Lingvo. La recenzantoj rekomendas la studon *Porfirinoj* de d-rino Flint, ankaŭ en la kadro de SUK, kiu helpas

vin kompreni kompleksajn aspektojn en la fotosintezo kaj metabolismoj (klorofilo, hemoglobino, vitamino B₁₂ k.a.).

La kvara libro estas la plej interesa el la serio pro la fakto, ke almenaŭ dek mil homoj mortas ĉiusemajne pro nutromanko tra la mondo (magazino *Time*, kanada eldono, 1974-11-11). Ekde la komenco de la historio, la homaro strebadas por gajni manĝaĵojn. La prezo de manĝaĵoj multobligas pro malbona klimato kaj tro alta kosto de artefaritaj sterkoj, kaŭzita de la naftokrizo. La aŭtoro montras statistike, ke la homaro ĉiutage plimultiĝas je 200 000 homoj (nombro de naskiĝoj minus nombro de mortoj). Kiel ni nutru la pasaĝeraron en tiu ĉi jam dense okupita aerŝipo "Tero"? Ĉu ni devas tolereme akcepti la koncepton de Malthus (kiam nombro de homoj superas kvanton de manĝaĵoj haveblaj, la naturo mem restarigas ekvilibron per plimultigo de mortoj), aŭ ofte priparolatan ideon de la franca milita termino "triage" (elelekto

**Prof. d-ro
Sin'itirô
Kawamura,
komitatano
de UEA,
prelegis
ankaŭ en la
pasintjara
sesio de ISU.**



(elelekto): kiam la provizoj ne sufiĉas, oni devas ilin uzi por la homoj, kiuj poste donos la plej bonajn rezultojn? Ĉu sciencistoj povas ludi pozitivan rolon por solvi tiun ĉi malfacilan problemon? La aŭtoro unue klarigas pri la nutrado, pri funkcioj de proteinoj en nia korpo, geografia aspekto de proteinliverado, prezo de proteinoj en tipaj manĝaĵoj (la statistikaĵoj estas bedaŭrinde malnovaj) kaj pri diversaj formoj de manĝaĵoj enhavantaj proteinojn, ekz., laktoj, ovoj, viandoj kaj plantoj. Sekvas analizaj diskutoj pri ĉiu ĉefa proteinriĉa manĝaĵo, aminoacidoj, aminoacido-konsisto de manĝaĵoj, plantaj manĝaĵoj kiel proteinfontoj, kun emfazo pri sojoj kaj sojproduktoj, vaste aplikataj en Japanujo.

Jen venas novaj manĝaĵoj: fiŝproteina koncentraĵo, plantaj viandoj kaj laktoj, aldono de aminoacidoj por riĉigi cerealajn, ekstraktado de proteinoj el verdaj folioj, unuĉelaj proteinoj, sintezo de aminoacidoj kaj proteinoj, artefarita viando el sojoj, gistoj el petrolo kaj petroldevenaj kombinaĵoj kaj proteinsintezoj el hidrokarbidoj kaj aliaj materialoj. La aŭtoro pasie montras kiel kombino de kemio, biologio, bakteriologio kaj inĝenieraj sciencoj povas ataki manĝaĵkrison. Kompreneble, la teknologio restas ankoraŭ en tre pionira stato. Oni bezonas multe da studado kaj planitan naskadon por solvi la plej malnovan problemon de la homaro.

La lasta libro klarigas kiel kemiisto aŭ studento direktu sin al taŭga literaturo por esplorado. La kemia literaturo estas klasifita en tri branĉojn: primara (originalaj raportoj), sekundara (resumoj kaj revuoj) kaj terciara (indeksoj). En la fino de la serio, la aŭtoro koncize diskutas pri la lingva problemo en la kemia dokumentado. Ironia fakto estas, ke 36 ĉefaj sciencaj gazetoj, kies titolo enhavas la vorton "internacia", aperas en kelkaj naciaj lingvoj. La aŭtoro ĉagrenas pro la fakto kaj esperas pri klopodoj de ni esperantistoj por realigi vere internaciajn sciencajn gazetojn en pli grandaj kvantoj kaj pli vasta uzo.

Kvankam la kvin libroj aspektas haste verkitaj kaj kvankam en ili troviĝas foje esprimoj, kiujn oni povas plibeligi (ekz., ripeto de pasivo), ili enhavas tre malmulte da fakaj eraroj kaj servas kiel bona ekzemplo por sekvantaj paŝoj. Fakte, la kvin libroj de prof. Kawamura konsistigas la tuton de la nun havebla literaturo kemia en la Internacia Lingvo, pro kio ili estas aparte bonvenaj por ĉiuj, kiuj havas intereson en tiu ĉi scienco.

Mendu ĉe UEA: Prezoj (laŭ la sinsekvo komence de ĉi tiu recenzo): 17,10 / 18,- / 13,20 / 20,40 / 13,20 (por Nederlando: 17,78 / 18,72 / 13,72 / 21,21 kaj 13,72) gld. plus sendokostoj 10%.

Sub fera hajlo

Recenzas Alec Venture (Britio):

Foraj steloj, La, de 8 div. aŭtoroj. Trad. el la vjetnama. Hanojo: Fremdlingva eldonejo, 1974. 254p. 19cm.

En ĉi tiu volumo troviĝas 12 noveloj verkitaj de 8 aŭtoroj ekde la jaro 1965. Simile al sia antaŭulo, *La horloĝisto de Djen Bjen Fu* (1971), ĝi celas speguligi diversajn aspektojn de la daŭra lukto de la Vjetnama Demokratia Respubliko kontraŭ la atakoj de usonaj aviadiloj kaj aliaj armiloj.

La noveloj priskribas la vivon de kamparanoj kaj vilaĝanoj sub militaj kondiĉoj, kaj rakontas preskaŭ ekskluzive pri homoj, kiuj plenumas tre konsciencie la devojn al ili konfidentajn de la lokaj partiaj funkciuloj. Nur en la lasta novelo, *La dramo de iu direktoro de kooperativo*, oni legas pri mallaŭdinda viro, kiu ne plenumas sian devon. La leganto konatiĝas kun la pezaj kaj respondecaj taskoj, per kiuj oni ŝarĝas junulinojn kaj maljunulojn, pro la militserva foresto de la junaj viroj.

Ĉi tiuj rakontoj, supozeble realecaj, kiuj komprenigas al okcidentano kial la lukto daŭras tiel longe kaj persiste, provizas interesan legaĵon.

Bedaŭrinde necesas diri, ke — kvankam la stilo de la tradukoj estas ĝenerale flua kaj ne malhelpas la legadon — tamen troviĝas tra la tuta libro iom tro da lingvaj kritikindaĵoj.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

Ĉu „regula” kaj „kompleta”?

Recenzas Naokazu Kawasaki (Japanio):

Kompleta lernolibro de regula Esperanto, de L. Mimó. Sabadell: la aŭtoro, 1973. 189p. 21cm. Broŝ.

La verko konsistas el 3 partoj: morfologio, sintakso, vortfarado (laŭ kompreno de la recenzanto).

El la titolo de la verko 3 vortoj — „kompleta”, „lernolibro”, „regula” — tiras mian atenton.

Ĉu „lernolibro”? Jes, tio estas evidenta ĉefe en la unua parto. Al koncizaj reguloj li aldonas abundon da vortaro kaj ekzercaro.

Ĉu „kompleta”? Ekz. pri *si*, *sia* lia klarigo ne estas tiel detala.

Ĉu „regula”? Laŭ kiu „regulo” regula? Li diras: „voĉdono, voĉdoninto (ne voĉdoni).” kaj li klarigas: „La vortoj kun VERBO ANTAŬATA DE SIA REKTA KOMPLEMENTO, ĉar tio estas kaŝa, kontraŭfunda-menta elizio de la akuzativo.” Sed tia malpermeso ne ekzistas en Ekzercaro. *Fungoserĉi* ne estas tiel utila kunmetaĵo, sed *voĉdoni* estas tre praktika.

Estas interese, ke li kritikas *Plenan Gramatikon* de Kalocsay kaj Waringhien. Ekz. pri volitivo ĉe subpropozicio.

La aŭtoro estas atismano. La recenzanto, kiu juĝas, ke nek itismo nek atismo estas teorie perfekta, bedaŭras, ke en tiu punkto la verko ne estas kontentiga.

Mendu ĉe UEA: 17,70 (por Nederlando 18,40) gld. plus sendokostoj 10%.



Bukedeto el slovakaj popolkantoj (1974) Div. trad. 58p. 20cm. 3,30 gld. Muziknotoj kaj Esperanta teksto de 54 slovakaj popolkantoj.

¿Habla usted en Esperanto? (Ĉu vi parolas en Esperanto?) (2a eld. 1975) Ergoto de Bonaero. 96p. 17cm. Ilus. 6,80 gld. Reviziita eldono de la unuaj 12 lecionoj el la 20-leciona lernolibro aperinta en 1972.

Kredu min sinjorino! (1950, 2a eld. 1974) C. Rossetti (1901-1950). 260p. 19cm. Broŝ. 5,22 gld. Aŭtobiografia romano verkita en tre vigla stilo. Enkondukoj de R. Schwartz kaj Reto Rossetti.

Stranga butikoj, La (1931, represo 1974) R. Schwartz (1894-1973). 128p. Ilus. 20cm. Broŝ. 7,92 gld. Represo de la gaja satira poemaro de unu el la plej elstaraj aŭtoroj en Esperanto.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Vekiĝo en Ateno

POST LA DECIDO de la Estraro de UEA, ke la 61a UK okazu venontjare en Ateno, vekiĝis ankaŭ la landa sekcio de TEJO en Greklando. La 18an de januaro 1975, en Ateno okazis ĝenerala kunveno de la junulara sekcio de Helena Esperanto-Asocio. La kunveno elektis novan estraron de la sekcio: d-ro Savas Tsiturides, prezidanto, f-ino P. Kondaku, ĝenerala sekretario, s-ro A. Fragias, kasisto, f-ino E. Daskalaki kaj s-ro S. Grigoropulos, estraranoj. Inter la unuaj aferoj, kiujn traktis la nova estraro, troviĝis ankaŭ la invito de la venontjara 32a IJK al Greklando.

Vintra Inowrocław

LA DUAN Internacian Vintran Junularan Feriadon en Inowrocław, Pollando, inter la 6a kaj 15a de februaro 1975, partoprenis 185 gejunuloj el Hungario, Jugoslavio, FR Germanio, Francio kaj Pollando. Dum la aranĝo funkciis dek diversgradaj Esperanto-kursoj kaj oni organizis dek vesperajn programojn dediĉitajn al unuopaj landoj kaj kulturoj. Interalie, al la feriantoj prezentigis du muzikaj Esperantaj ensembloj — "Ni-74" kaj "Krajanoj", el kiuj precipe la lasta gajnis simpatieco de la aŭskultintoj. Ankaŭ ĉi-foje la Feriadon aranĝis "Juventur", Buroo de eksterlanda turismo, kaj Pola Esperanto-Junularo. Fine de julio kaj en la komenco de aŭgusto 1975, "Juventur" (str. Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz) samloke organizas similan someran aranĝon.

La plej suda grupo

FINE DE 1974, okazis la sesa en la vico de ĉiujaraj tendaroj de EJANZ, la landa sekcio de TEJO en Nov-Zelando. La tendaro, kiu daŭris ses tagojn, okazis ĉe Cooper's Creek (aŭ "Creak" — knaro, ĉar rivereton akvomankan oni transiris laŭ malforta brua ponto), apud Christchurch en la Suda Insulo. Partoprenis 23 gejunuloj, kiuj multe studis en grupetoj, legis kaj verkis. Oni aranĝis tuttagan ekskurson, kiu montriĝis pli komplika ol milita manovro, kvankam nur unu aŭtomobilo paneis. La partoprenintoj ekzercis dramajn erojn kaj diskutis la historion de Esperanto en Nov-Zelando, ĉar multaj ĉeestantoj estis novuloj el la nova junulara grupo en Dunedin. Tiu grupo kunvenas ĉiudimanĉe, praktikas Esperanton kaj entreprenas mongajnajn aktivecojn. Ĝi havas ĉ. 20 membrojn kaj ĝia sekretario (Mark Fynmore, 25 Elliot St, Anderson's Bay, Dunedin, Nov-Zelando) asertas, ke lia grupo estas "la plej suda en la mondo". Krome, okazas paŝoj por kunligi agemajn junularajn grupojn de Pacifiko kaj Azio (TEJO-regionoj 2b kaj 2c). Se tiu kampanjo ne atingas kunlaboremulon, tiu skribu al: EJANZ, Box 40-181, Upper Hutt, Nov-Zelando.

Karavano al Fredericia

INTERNACIA KULTURA SERVO el Zagreb, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb), anoncas junularan karavanon al la 31a IJK en Fredericia. Oni veturos aŭtobuse el Zagreb la 17an de julio, kaj revenos aviadile el Kopenhago la 26an de julio 1975.



FREDERICIA-HALLEN estos la kongresejo de la 31a IJK de TEJO. Laŭ informoj, ricevataj de aktivuloj de Dana Esperanto-Junularo, kiu organizas la aranĝon, ĝis la fino de februaro al la 31a IJK jam aliĝis 140 gejunuloj el 19 landoj.



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Dua Bulteno dissendita

Al ĉiuj ĝisnunaj aliĝintoj al la 60a UK estas jam dissendita la Dua Oficiala Bulteno, belaspekta 32-paĝa ilustrita kajero kun ĉiuj necesaj informoj pri la provizora programo, ekskursoj, loĝado, bankedo, postkongresaj aranĝoj, TEJO-kongreso, blindula kongreso kaj infana kongreseto, plus, kompreneble, diversaj mendiloj kaj rabatkupono por fervoja bileto.

Unika dustadia postkongreso

Al la jam anoncita postkongresa aranĝo en la dana urbo Aarhus aldoniĝis nova dimensio "post-postkongreso" en Gotenburgo (Svedujo). La programo en Aarhus daŭras de la fino de la UK ĝis la 6a de aŭgusto, kiam oni povos favorpreze pluvojaĝi per ŝipo al Svedujo. La postkongreso en Gotenburgo daŭros de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto. Detalaj informoj kaj aliĝiloj por tiuj du bonege kombineblaj sed tamen sendependaj aranĝoj troviĝas en la Dua Bulteno. Aliaj interesitoj povas peti informojn ĉe jenaj korespondadresoj: Postkongreso de Esperanto 1975, Hørmarksalle 5, DK-8240 Risskov, Danlando; kaj Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedujo.

Du teatraj vesperoj en preparo

LKK pritraktas plurajn proponojn pri teatraj programoj en la 60a UK. Jam nun ni povas menci, ke la konata pola aktorino Jadwiga Gibczyńska, okaze de la Internacia Jaro de Virino, preparas unupersonan teatraĵon pri la sciencistino Maria Curie; dume, la Bulgara Esperanto-Teatro prilaboras la klasikan komedion *La servisto de du mastroj* de C. Goldoni.

Klubvespero pri Kopenhago

Jam plurloke tra la mondo okazas specialaj programoj en Esperanto-societoj dediĉitaj al la lando aŭ la urbo de la 60a UK. Por helpi la klubojn, kiuj deziras aranĝi tian programon, LKK pretigis serion de 20 diapozitivoj pri Kopenhago kaj ĉirkaŭaĵo kaj sonbendon kun salutoj kaj invito de LKK. Interesitaj organizantoj bv. sin turni al la adreso de LKK. En multaj landoj ekzistas eblecoj aranĝi tiajn programojn kun helpo de loka dana klubo aŭ kun la dana ambasado.

Gajnu senpagan partoprenon en la jubilea UK!

Personoj loĝantaj en landoj el kiuj ne estas eble transpigi la kotizon por la Universala Kongreso, havas ŝancon gajni senpagan partoprenon kaj restadon en Kopenhago! La Kongreso anoncas internacian konkurson, kies premioj konsistas el 5 sumoj po 300,- guldenoj. Tiu sumo sufiĉas por pagi la aliĝkotizon kaj loĝadon dum la tuta kongresa semajno en komuna loĝejo, plus iom da poŝmono. Partopreni la konkurson rajtas nur tiuj, kiuj ne havas eblecon transpigi la kotizon por la Kongreso. Konkursantoj devas verki artikolon aŭ eseon pri la ĉeftemo de la Kongreso "la virino", okaze de la Internacia Jaro de Virino, kaj sendi ĝin plej malfrue ĝis la 31a de majo 1975 al la konstanta adreso de la UK: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Laŭ ebleco, la premiitaj verkoj estos utiligitaj en la kongresaj laborkunsidoj, en tiu ĉi revuo aŭ aliloke. La monon por la premioj donacis kongresanoj kontribuintaj al Adopta Kaso.

Du karavanoj el Jugoslavio

La ĉiam pli aktiva Internacia Kultura Servo (IKS) en Zagreb organizas du apartajn karavanojn al Danlando ĉi-jare: unu por la partoprenantoj de la TEJO-kongreso en Fredericia (v. la paĝon 54) kaj la alian por la aliĝintoj de la Universala Kongreso en Kopenhago. La karavano al la UK komenciĝos en la flughaveno de Zagreb, sabaton, la 26an de julio. La vojaĝprezo estas nur 1 180 dinaroj aŭ 190 germanaj markoj. Petu pliajn informojn de IKS, Amruševa 5/I YU-41000 Zagreb.

Komuna beneluksa karavano

Kongresanoj el la beneluksaj landoj (Belgujo, Nederlando kaj Luksemburgo) povas avantaĝe partopreni flugkaravanon, kiun organizas la oficiala agentejo de SAS en Nederlando. La vojaĝo estas nur por la kongresa semajno (de sabato ĝis sabato) kaj inkluzivas restadon en unuaklasa hotelo. Partoprenantoj povas ekflugi laŭplaĉe el Luksemburgo, Bruselo, Antverpeno aŭ Amsterdamo. La inkluziva prezo ekde Amsterdamo estas 749 aŭ 835 guldenoj, respektive por 2- aŭ 1-lita ĉambro. Detale informas: Dammers & van der Heide & Co. Boompjes 57, Rotterdam 3001, Nederlando; telefono: 14 60 11.

Statistiko de la aliĝintoj (1975-02-28)

Arg. 1, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 4, Belg. 17, Braz. 3, Brit. 41, Bulg. 17, Ĉeĥosl. 2, Danl. 108, Egipt. 2, Finn. 48, Franc. 61, FRG 75, Grek. 4, Hind. 1, Hisp. 12, Hung. 29, Irl. 1, Isl. 7, Isr. 4, Ital. 31, Jap. 25, Jug. 7, Kan. 6, Kor. 2, Malag. 1, Meks. 2, Monako 1, Ned. 80, Nor. 7, Nov-Z. 1, Pol. 8, Portug. 3, Rum. 1, Sud-Afr. 4, Sved. 91, Svisl. 13, Turk. 1, Urug. 1, Usono 36, Vjetn. 1, Zair. 1. Entute: 764 aliĝintoj el 42 landoj.

Belgio

- Jam komence de februaro, Belga Esperanto-Federacio sukcesis varbi la minimumon de 300 abonantoj de nia revuo, kiun ekde la komenco de ĉi tiu jaro ricevas ĉiuj membroj de BEF anstataŭ la antaŭa landa Esperanto-revuo *Sonorilo*. Temas pri speciala aranĝo inter BEF kaj UEA (v. nian revuon de decembro 1974, p.202), pri kio montras intereson ankaŭ la landaj asocioj en Britio, Italio kaj Kanado. Tamen, ĉar la aranĝo kun BEF estas eksperimenta, UEA ne pretis ĉi-jare eniri novajn aranĝojn tiaspecajn.

Japanio

- Laŭ *Ponto*, bulteno de Tokia Esperanto-Klubo, en la japana ĉefurbo antaŭ nelonge ekfunkciis t.n. "telefona servo". Elektinte la numeron 371-5644, inter la 9a horo vespere kaj la 9a matene, oni povas aŭdi novaĵojn el la Esperanto-movado kaj paroladojn de eksterlandaj esperantistoj. Unu el la celoj de la servo estas klopodo influi la prononcon de japanaj komencantoj per la surbendigitaj paroladoj de eksterlandanoj.

Portugaliao

- Kiel jam antaŭe anoncite en nia revuo (julio/aŭgusto 1974, p.136), la Esperanto-movado en Portugaliao revigliĝis post la pasintjaraj reĝimŝanĝoj en tiu lando. En pluraj lokoj jam funkcias kursoj kaj lokaj societoj. Portugala Esperanto-Asocio nun anoncas la okazigon de la unua Portugala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos inter la 7a kaj 10a de junio 1975, en Braga, en la norda parto de la lando. Informojn donas: Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. João Couto, Lote 1238, Lisboa.

Usono

- La prezidanto de UEA, d-ro H. R. Tonkin, la 21an de februaro 1975 estis gasto de Esperanto-societo de Novjorko, antaŭ kies membroj li prelegis pri la aktuala problemaro de UEA. La saman tagon d-ro Tonkin renkontiĝis kun ses funkciuloj de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj kaj kun la UEA-reprezentantoj ĉe UN, s-roj Mark Starr kaj Newell Lorie.

Finnlando

- Instigite de antaŭaj sukcesoj, en Väaksy oni ĉi-jare organizas du Esperanto-aranĝojn. Temas pri internacia tendaro inter la 6a kaj 14a de julio kaj pri Esperanta studsemajno inter la 5a kaj 13a de julio 1975. Ambaŭ aranĝoj inkluzivas diversgradajn Esperanto-kursojn, kiujn gvidos i.a. A. Pettyn el Pollando kaj A. Ciccanti el Italio.

FR Germanio

- La 19an de decembro 1974, en Hamburgo fondiĝis "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof, Domo por Internaciaj Renkontiĝoj". Temas pri iniciato de hamburgaj esperantistoj (ĉefe de la eksa LKK de la 59a UK) kun s-ro H. Wielgus kiel prezidanto de la nova centro. Fakte, tiu centro, kiu celas fariĝi iaspeca "germana Grésillon", ankoraŭ ne ekzistas, kaj la foto, kiun ni aperigas montras nur domon, kiu iam rolis (aŭ eble ankoraŭ rolas) kiel eventuala estonta centro. Tiu ĉi aŭ simila konstruaĵo (plejofte temas pri eksaj lernejoj) kostas ĉ. 150 000 germanajn markojn, kiujn la novfondita instanco planas akiri ĉefe per subteno de tiuj esperantistoj, kiuj pretas membriĝi pagante 1 000 germ. markojn kaj tiamaniere fariĝi kunposedantoj de la estonta centro. La iniciatintoj konfesas, ke ia sumo jam estas kolektita, sed oni ne malkaŝas ĝin.

- Komence de februaro, en Paderborn oni inaŭguris la gastejon "Bareleto", kiu servas ankaŭ kiel kunvenejo de la novfondita Esperanto-societo tie. Restas por miri, kiamaniere la aktivuloj de Paderborn sukcesis venigi al la inaŭguro ne nur plurajn eminentulojn de la loka kaj regiona kultura vivo, sed ankaŭ ĵurnalistojn de pluraj gazetoj, radio-kaj televid-raportistojn.

Kanado

- Unu monaton post la 17a Kanada Kongreso de Esperanto (Calgary, 1975-06-28 – 06-30), Esperanta Rondo de Toronto anoncas internacian someran kurson en Georgian College of Applied Arts and Technology, 401, Duckworth Street, Barrie, Ontario, situanta 70km norde de Toronto. Temas pri kurso simila al tiuj, kiujn dum pluraj lastaj jaroj organizas la Universitato de San-Francisko en Usono. Ankaŭ la kurson en Kanado gvidos W. Auld.

Danlando

- La dana ministerio pri kulturo ankaŭ ĉi-jare asignis 30 000 d.kr. por subteni turneon de unu el la trupoj, kiuj en oktobro partoprenos la Pupteatran Internacian Festivalon en Zagreb, Jugoslavio. Oni atendas, ke ĉi-jare en Danlando gastos pup-teatro el Bulgario. Dum kelkaj antaŭaj jaroj similajn vizitojn al Danlando faris teatroj kaj pupteatraj grupoj el Jugoslavio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio. La turneojn organizas s-ro P.V. Bagger, gimnazia instruisto en Roskilde.



Esperanto-Centro 'Dr. Zamenhof'
Domo por internaciaj renkontiĝoj

Irano

- S-ro Mohammed Labil, kiu post dudekjara foresto revenis al sia patrolando Irano, antaŭ nelonge ek- gvidis Esperanto-kurson en la ĉefurbo Teherano. Al la kurso aliĝis ĉ. 100 gestudentoj.

Pollando

- La 5a Esperanto-feriado en Mied- zyzdroje okazos inter la 16a kaj la 27a de junio 1975, kaj ne inter la samaj datoj en majo, kiel ni erare informis en la decembra numero. La aranĝo, organizata de la turisma agentejo "Gromada" (Plac Lotników 7, PL 70 414 Szczecin) kaj Pola Esperanto-Asocio, interalie inkluzi- vas tri diversgradajn Esperanto- kursojn.

Malto

- Laŭ letero de s-ro Carmel Mallia, malta poeto gajninta plurajn premi- ojn en internaciaj Esperanto- konkursoj, antaŭ kelka tempo du radio-stacioj en Malto disaŭdigis 30- minutan kaj 20-minutan programojn pri Esperanto. Unu el la plej grandaj lokaj ĵurnaloj aperigis ampleksan artikolon pri la Internacia Lingvo. En la lando funkcias pluraj kursoj de Esperanto.

Rumanio

- Lastatempe en pluraj rumanaj urboj estas oficialigita la ekzisto de lokaj Esperanto-organizaĵoj, i.a. en Bukareŝto, Temisoara, Craiova, Galati kaj Suceava. Ankaŭ en pluraj aliaj lokoj funkcias kursoj kaj kluboj.



Ekonomia Komunaĵo. Kaj s-ro Govaers kaj s-ro Visine estas apogan- toj de la Internacia Lingvo.

Forster

- Mag. Peter G. Forster, brita eko- nomiisto laboranta ĉe la Universitato de Hull (Britio), ricevis specialan stipendion de British Council por esplorstado en la Biblioteko Hodler en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. La esploroj rilatas ampleksan studon pri la sociologio de la Esperanto-movado. Iuj materialoj de tiu studo jam aperis en la revuo de TEJO, *Kontakto* (n-ro 3/1971, p.12-16).

Balbin

- Dum la jarfinaj seminarioj de la Modernlingva Asocio de Usono (v. nian februaran numeron, p.26), prof. Julius Balbin estis invitita partopreni ekspozicion de konkreta poezio en la granda balejo de la hotelo "Americana" en Novjorko, kie okazis ankaŭ la seminarioj. Temis pri la Esperanta poemo "Drink Coca Cola", kiu ne notis sukceson ĉe la prijuĝa komisiono de la pasintjaraj Belartaj Konkursoj. Grandformata kaligrafiaĵo kun la poemo havis klaran indikon, ke temas pri poemo en Esperanto. Prof. Balbin estas invitita partopreni similan ekspozicion, kiun fine de ĉi tiu jaro en San-Francisko organi- zos la Usona Instituto por la Esplo- roj de Literatura Verkado.

Fayot

- S-ino Juliette Fayot, dumviva membro, vicdelegito kaj ĝis antaŭ nelonge fakdelegito de UEA en Parizo, verkinto de la ampleksa es- perantlingva *Gvidlibro tra Parizo*, la 15an de februaro 1975 estas distin- gita per la Bronza Medalo de la franca ĉefurbo.

Eldonaĵoj

- Laŭ iniciato de prof. d-ro R.E. Wood, la prestiĝa kvaronjara usona periodaĵo *Books Abroad*, kiu enha- vas artikolojn kaj recenzojn pri libroj eldonitaj eksterlande kaj spe- ciale en aliaj (ne en la angla) lingvoj, ĵus nomis d-rojn Tonkin kaj Wood recenzistoj por la Esperantaj libroj. La adreso de la revuo estas: *Books Abroad*, 401 W. Brooks, Rm. 45-A, University of Oklahoma, Norman, Oklahoma 73069, Usono. Inter la unuaj recenzoj, kiuj pri la Esperan- taj libroj aperos en la revuo, estos tiu de d-ro Tonkin pri *Esperanto en Perspektivo*.

Ornitologio

- La ĉi-jara ornitologia renkontiĝo, aranĝo, kiu dum la lastaj jaroj ĉiam okazas lige al la Universalaj Kongre- soj, estas planita por la periodo inter la 2a kaj 6a de aŭgusto en Norra Lökäröd, Svedio. Por pliaj in- formoj bv. kontakti s-inon B. Lin- deberg, Klubbegatan 75, S-21 223 Malmö, Svedio.

Lernejoj

- La 9a Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lerne- jojn, ligita al la eksperimenta instruado en la t.n. regiono I de ILEI (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio), okazos inter la 28a kaj la 30a de marto 1975, en sia konstanta sidejo Maribor.

Enciklopedioj

- En la 7a volumo, aperinta en februaro 1975, de la katalunlingva *Gran Enciclopèdia Catalana* troviĝas artikoloj pri "esperantismo", "espe- rantisto" kaj "Esperanto", kun entute pli ol 900 vortoj kaj du ilus- traĵoj. La artikolojn verkis Manuel Casanoves, fakdelegito de UEA pri la kataluna lingvo, kaj redaktoro Roger Alier.



Lapenna

- El la lasta pasintjara numero de *L' Esperanto*, revuo de Itala Espe- ranto-Federacio, ni eksciis, ke prof. d-ro Ivo Lapenna dum la 45a Itala Kongreso de Esperanto (septembro 1974) estas proklamita kiel honora membro de IEF.

Govaers

- S-ro Michel Govaers, ĝenerala sekretario de Eŭropcivitisma Eduka Centro, la eldonanto de *Eŭropa Dokumentaro*, kiu ekde la pasinta jaro aperas ankaŭ en Esperanto, antaŭ nelonge estis distingita per la ordeno "Eŭropa Merito". La orde- non transdonis s-ro François Visine (maldekstre sur la foto), prezidanto de la fondaĵo "Eŭropa Merito" kaj tre konata personeco en la Eŭropa

N-ro 487, 1975-01-31

ELEKTO DE KOMITATANOJ B:

SEP KANDIDATOJ POR KVAR VAKAJ LOKOJ

ALDONE AL LA ANONCOJ pri la elekto de novaj komitatanoj "B" de UEA en la septembra kaj novembro numeroj de *Esperanto* (paĝoj 149 kaj 199, respektive), ni informas, ke ĝis la anoncita limdato — la 31a de decembro 1974 — alvenis validaj proponoj por entute sep kandidatoj. Jen la alfabeto listo de la kandidatoj: Wim Jansen (Nederlando), Heta Kesälä (Finnlando), Helmut Klünder (FR Germanio), Boris Kolker (Soveta Unio), Grégoire Maertens (Belgio), Raif Markarian (Britio) kaj Terttu Tyynelä (Finnlando). Voĉdonilo pri la kandidatoj estos rekte sendita al ĉiuj ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne al vicdelegitoj kaj fakdelegitoj). Post la paso de la limdato pri la voĉdono, en ĉi tiu revuo aperos anonco pri nove elektitaj komitatanoj "B" de UEA.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

FINN: N. Kavenius, Irja Klemola. FRG: Elfriede Kruse. ISL: Walter T. Murawski. US: T.H. Booker, S. Mudry, S.B. Teeples.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

DANL: 14 P.O.P. Andersen. US: 15 Alfonso Correa, 16 J. Parkerson, 17 Vasco R. Geer Jr., 18 Ruth M. Evans, 19 David R. Evans. BRIT: 20 C.M. Houghton. DANL: 21 Alf B. Sørensen. FRG: 22 Felix Epstein, 23 Louis Beaucaire. AUSTRAL: 24 L. Scott. BRIT: 25 D. Kennedy. FRG: 26 H. Bily. BRIT: 27 K.A. Sly. NED: 28 G.M.J.B. Peet. US: 29 d-ro F.J. Belinfante. SVED: 30 S. Szabad, 31 O. Persson. US: 32 d-ro H.R. Tonkin. NOV-ZEL: 33 G. D. Dewar. FRG: 34 d-ro E. Fritsch, 35 W. Klünder. SVED: 36 Torsten Lindberg, 37 D. Kullberg, 38 Einar Rasmussen, 39 E. Sundborg. FINN: 40 Aarne Ratalahti.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de

nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-05-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

AŬSTR: Hans Joachim Plehn, FD Wieselburg. BRAZ: Benedicto Silva, FD Monte Aprazível. ĈEĤOSL: K. Kraft, FD Příbram. DANL: Eva Langkilde, D Helsingør; Ejnar Langkilde, VD Rungsted Kyst. FINN: Matti Rekunen, D, FD Kangasala. FRANC: F. Chérault, FD Andernos-les-Bains; Sonia Amariglio, FD Bourg-la-Reine. HUNG: G. Kovács, D Békéscsaba; E. Molnár, D Budapest; J. Patay, VD Budapest; Erika Bardocz, FD Budapest; I. Eöry, VD Győr. ISR: David Mager, D, JD Beer-Ševa. ITAL: C. Arieti, FD Roma. JAP: Seiči Kato, D Matumoto; Seiziro Kawamura, D Uĵi-si. US: L.A. Ware, D Coralville; V.B. Stewart, JD Springfield; L. Edwards, VD Tampa; Lee Edwards, D Temple Terrace; Rubén Feldman González, FD Warren Pa.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1974, Unua Parto:

AŬSTR: Graz, FD (instruado) kaj FD (SOS-aŭtoservo); Linz. BELG: Bornem. BRIT: Bridlington. DANL: Helsingør. FRG: Köln, FD (stenoĝrafio). ITAL: La ĉefdelegito de UEA; Massa, D. RUM: Satu-Mare. SVED: Falköping, FD (fervojoj).

NOVA ĈEFDELEGITO DE UEA POR ITALUJO

Itala Esperanto-Federacio ĵus nomis kiel novan ĉefdelegiton de UEA por Italujo d-ron Nicola Minnaja (Via S.

Carlo 131, I-20017 Rho-Milano; telefono 9 30 14 40), delegito jam de 15 jaroj, iama ĝenerala sekretario de TEJO kaj nun ankaŭ redaktoro de la landa revuo *L'Esperanto*. D-ro Minnaja transprenas la oficon de ĉefdelegito de d-ro Mario Dazzini, kiu eksigis el UEA kaj al kiu ni dankas pro la plurjara servo en tiu funkcio.

Same kiel antaŭe, la peradon de kotizoj por Italujo prizorgas la oficejo de Itala Esperanto-Federacio en Milano, dum la ĉefdelegito estas respondeca nur pri la delegita reto kaj pri la varbado ĝenerale.

NOVA ĈEFDELEGITO DE UEA POR ĈEĤOSLOVAKIO

Interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA, Ĉeĥa Esperanto-Asocio nomis kiel novan ĉefdelegiton s-ron Linhart Rýznar (Adreso: Antonína Slavička 22, CS-568 02 Svitavy). Li transprenas la oficon de inĝ. Fr. Sviták, kiu devis forlasi ĝin, post plurjara servo, pro malbona vidpovo. Dankante al inĝ. Sviták, ni samtempe deziras al li plenan resaniĝon kiel eble plej baldaŭ.

S-ro Rýznar estas multjara membro de UEA kaj delegito en Svitavy ekde 1956. La membroj, kiuj kutimis kotizi por UEA pere de inĝ. Sviták, de nun bonvolu turni sin al s-ro Rýznar.

KIAL FORESTAS LA LISTO DE DONACOJ?

Kiel kutime komence de nova jaro, la librotena fako de la Centra Oficejo estas troŝargita per la pretigo de la bilanco por la pasinta jaro. Tio estas la ĉefa kaŭzo, ke vi ne trovas en ĉi tiu numero la liston de la plej novaj donacoj. Alia, feliĉiga, kaŭzo de tiu manko estas la multnombreco de la donacoj, kiuj alvenis en la komenco de ĉi tiu jaro. Ni afable petas bonvolan pardonon.

AVERTO: TIU ĈI NUMERO
DE LA REVUO
ESTAS LA LASTA, KIUN VI RICEVAS, SE VI
ANKORAŬ NE PAGIS POR LA ABONO EN 1975.
La abontarifo aperas sur la dua kovrila paĝo de ĉi
tiu revuo. Ni petas, ke vi prefere pagu al vialanda
ĉefdelegito aŭ peranto (v. la aldonitan faldfolion).

La membraro de UEA en 1974

Lando	AM	IM	Sume
Acoroj	-	1	1
Afriko Hispana	-	1	1
Antiloj Nederl.	-	1	1
Argentino	250	38	288
Aŭstralio	285	186	471
Aŭstrio	300	80	380
Bahrejno	-	1	1
Belgio	500	164	664
Brazilo	400	271	671
Britio	934	445	1379
Bulgario	5100	84	5184
Centra Afr. Resp.	-	1	1
Cipro	-	1	1
Ĉeĥoslovakio	1100	131	1231
Ĉilio	-	1	1
Ĉinio	-	2	2
Danlando	410	136	546
Egiptio	-	7	7
Etiopio	-	1	1
Filipinoj	-	1	1
Finnlando	280	218	498
Francio	831	604	1435
FR Germanio	1100	465	1565
Germana DR	-	15	15
Greklando	400	31	431
Hinda Unio	-	9	9
Hispanio	550	192	742
Hongkongo	-	2	2
Hungario	3100	139	3239
Indonezio	-	5	5
Irako	-	3	3
Irano	-	2	2
Irlando	25	9	34
Islando	-	22	22
Israelo	200	40	240
Italio	1300	275	1575
Japanio	-	283	283
Jugoslavio	1500	198	1698
Kanado	110	100	210
Kenjo	-	2	2
Kolombio	-	6	6
Koreo (Suda)	150	26	176
Kostariko	-	2	2
Kubo	-	9	9
Kuvajto	-	1	1
Laoso	-	1	1
Libano	-	4	4
Luksemburgo	-	3	3
Malagasa Resp.	25	5	30
Maŭricio	-	3	3
Meksikio	-	18	18
Monako	32	3	35
Mozambiko	-	1	1
Nederlando	691	461	1152
Niĝerio	-	2	2
Norvegio	417	90	507
Nov-Gvineo	-	1	1
Nov-Zelando	170	88	258
Pakistano	-	1	1
Panamo	-	1	1

Lando	AM	IM	Sume
Peruo	-	9	9
Pollando	4150	211	4361
Portoriko	-	1	1
Portugalia	-	31	31
Reunio	-	1	1
Rodezio	-	1	1
Rŭando	-	1	1
Rumanio	-	13	13
Saŭdi-Arabio	-	1	1
Senegalio	-	1	1
Singapuro	-	1	1
Sovet-Unio	-	60	60
Srilanko	-	2	2
Sud-Afriko	30	24	54
Sudano	-	1	1
Svedio	1000	497	1497
Svislando	200	193	393
Tajlando	-	1	1
Tunizio	-	2	2
Turkio	-	1	1
Urugvajo	25	5	30
Usono	300	561	861
Venezuelo	-	17	17
Vjetnamio (Suda)	-	8	8
Zairio	25	7	32

ENTUTE: 25890 6543 32433

RESUMA DETALIGO DE LA MEMBRO-STATISTIKO DE UEA POR 1973 KAJ 1974

	1973	1974
Membro-Jarlibro	734	717
Membro-Abonanto	4 860	4 265
Membro-Subten.	301	232
Dumviva Membro	945	982
Honora Membro	18	13
Juna Membr.Jarl.	37	65
Juna Membr.Ab-on.	187	129
Membr.Ab-on. K-to	149	126
Individuaj membroj	7 231	6 543
Asociaj membroj	22 379	25 890
Membroj entute	29 610	32 433
Simplaj abonoj	165	167
Pagintoj entute	29 775	32 600

RIMARKO: Al la malkresko de la individua membraro grave kontribuis la fakto, ke Fondaĵo Canuto ne havis monon pro nefinitaj kontoj de la UK en Beograd. Japanio aperas sen asociaj membroj, ĉar la pago ne alvenis ankoraŭ.

Nekrologoj

JAN HENDRIK VINK 1897-1975

En Hago, Nederlando, la 23an de februaro 1975 forpasis Jan Hendrik Vink, kunaĵa figuro en la landa Esperanto-movado. Dum sia longa aktiveco en la Movado, li okupiĝis pri eldonado, estis sekretario de la loka grupo kaj poste ankaŭ prezidanto de LEEN, la landa asocio de UEA en Nederlando. Lastatempe li estis kasisto de la reaktiviĝinta Internacia Esperanto-Instituto.

MARIA LOIBEL

En Vieno, Aŭstrio, la 28an de februaro forpasis Maria Loibel, kasisto de Aŭstria Esperantista Federacio. Ŝi estis kasisto ankaŭ en la Loka Kongresa Komitato de la 55a UK en Vieno en 1970.

KĀRLIS KRAUJINŠ 1879-1975

En sia 96a vivjaro, la 28an de januaro 1975, forpasis Karlis Kraujņš, verkisto, veterano en la Esperanto-movado de Latvio.

GEORG CHR. SACK 1912-1975


En Heidelberg, FR Germanio, la 4an de januaro 1975 mortis Georg Chr. Sack, altlerneja muzikinstruisto, unu el la plej agemaj komitatanoj de Muzika Esperanto-Ligo kaj sekretario de Muzika Terminara Komisiono.

CLEMENT N. AYRES 1882-1974

La 11an de septembro 1974, en Usono forpasis Clement N. Ayres, kiu eklernis Esperanton en la fruaj 30aj jaroj kaj estis membro de UEA de post la jaro 1939.

JULIO CSAPÓ 1906-1974

La 19an de decembro 1974, en Satu Mare, Rumanio, forpasis Julio Csapó, kiu aktivis en la Movado de post la jaro 1921 kaj dum longa tempo servis ankaŭ kiel delegito kaj fakdelegito de UEA. Inter la du mondmilitoj, li estis la ĉefa aktivulo por Esperanto en la regiono de la rumana urbo Timisoara.



Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Por aliaj detaloj vidu la januan numeron.

RADIO ROMO nun disaŭdigas sian dimanĉan programon de 20.00 ĝis 20.20 GMT per ondoj 49.92m (6010 kHz), 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz). La programo temas pri "Novaĵoj el Italujo", "Kuriero de Esperanto", "Leterkesto". Kun ĝojo la redaktoro akceptos informojn, sugestojn, rimarkojn koncerne aŭdeblecon kaj enhavon de la programoj, kaj Esperanto-publikaĵojn; eĉ simpla poŝtkarto helpas lin en lia laboro. Por urĝaj kaj aktualaj aferoj, oni prefere uzu la privatan adreson de

la redaktoro: D-ro Antonio de Salvo, via Clelia 88, I-00182 Roma, Italio. Aliajn korespondaĵojn oni sendu al Radio Roma, Esperanto-fako, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio. Kunlaboras pri la elsendoj f-ino Mirella Merlani kaj d-rino Vera di Tocco.

RADIO VIENO. Diversaj ŝanĝoj okazis pri tagoj, horoj kaj ond-longoj; jen la nova tabelo de la programoj el Aŭstrio:
— dimanĉe, de 05.45 ĝis 05.55 GMT per ondoj 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz), ripeto de la antaŭa sabata programo;
— sabate sen ŝanĝo, tio estas de 16.45 ĝis 16.55 GMT per ondoj 48.74m (6155 kHz), 16.78m (17780 kHz);
— marde (anstataŭ merkrede) de

17.35 ĝis 17.45 GMT per ondo 203m (1475 kHz), nur ĉiun kvaran sinsekvan mardon: 4-III, 1-IV, 29-IV, 27-V, ktp. Raportoj pri aŭskultado, sugestoj, kritikoj estos bonvenaj; ili estas sendotaj al O.R.F., Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.

RADIO VARSOVIO. El ĉi tiu stacio ni povas daŭre aŭskulti programon en Esperanto trifoje ĉiutage. Kelkaj ŝanĝoj aperis en la matena elsendo: sama horo, tio estas de 05.00 ĝis 05.30, sed per ondoj 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Aliaj elsendoj, inkluzive de la "anguletoj" dum nacilingvaj programoj, restas tiuj indikitaj en la tabelo aperinta sur paĝo 18 de la januara numero.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondas nur la anoncantoj.

LA TORNISTRO (bona distro) n-roj 1, 2 kaj 3. Varia enhavo ilustrita: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, kotopo. 52p. 22cm. Prezo: po 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ po 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.

Helpemaj esperantistoj estas invitataj eltrovi ĉu ekzistas propralanda listo de asocioj por suferantoj diversmalsanaj. Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Pagantaj gastoj estas akceptataj en mia hejmo en jutlanda vilaĝo apud maro kaj arbaro, iom sude de Aarhus. Loko por ekz. gepatroj kun 3 ĝis 4 infanoj. Petu informojn: Tove Madsen, Sølbyvej 40, DK-8354 Hov, Danlando.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.

Du studentoj (19–17j.) dez korespondi kun la t.m. Skribu al: Luiz Carlos Machado kaj Daniel Alves, Caixa Postal 6594, São Paulo, Brazilo.

POSTKONGRESO 1975! Unika aranĝo inter oficiale ĝemelaj urboj — AARHUS, Danlando, de la 3a ĝis la 6a de aŭgusto, kaj GOTENBURGO, Svedio, de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto. Petu informojn kaj turismajn prospektojn de la respektivaj adresoj: Postkongreso, Hørmarksalle 5, DK-8240 RISSKOV-Aarhus, Danlando / Postkongreso, Box 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi sportajn insignojn kun la tuta mondo. Nikolai Kizem, Rade Končara 250, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Kiu bonsamariano sendos al mi unu-du ekzemplerojn de legindaj, abonindaj pentekostgazetoj en lingvoj nederlanda aŭ germana? Antaŭdankas vin: Ernesto Venter, Posbus 828, 1390 Phalaborwa, Sud-Afriko. (Korespondemuloj, for! Tro okupita!).

Propagandcele ni petas leterojn kaj poŝtkartojn por nia ekspozicio, la 20an de aprilo 1975. Respondo al ĉiuj. Esperanto-grupo de Lappeenranta, SF-53300 Lappeenranta 30, Finnlando.

Korespondemuloj! Skribu leterojn al la letervespero en Stokholma Rondo de KELI. Ĝi okazos la 19an de aprilo ĉ.j. Adresu la leterojn al: s-ro Vilhelm Grahn, Jämtlandsgatan 86, S162 20 Vällingby, Svedujo.

Ricard Sans (14-jara) deziras korespondi kun ĉiuj landoj por praktiki la lingvon. Li kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Nepre respondos. Adreso: Avenida Tarragona 16-18, Vilafranca del Penedes (Barcelona), Hispanujo.

Se vi ne scias kiel havigi verkojn de nobelpremiitoj en Esperanto. . .

ALIĜU AL IKS-LIBROKLUBO!

En 1975 estas preparataj la plej famaj prozverkoj el la pasinta 1-2-jara monda librosezono, en amplekso de ĉ.900 paĝoj, en la kadro de **FURORO-SERIO 1975:**

1. Heinrich Böll (germana nobelpremiito 1972): "Novelaro"
2. Patrick White (aŭstralia nobelpremiito 1973): "Novelaro"
3. Miguel Angel Asturias (gvatemala nobelpremiito 1967): "Sinjoro prezidanto", romano
4. Miroslav Krleža (kroata ĉefverkisto): "Rande de l' saĝo", romano.

Abono por IKS-libroklubo 1975: 4,5 sv.fr. aŭ egalvaloro. Kompleta abonkosto de **FURORO-SERIO 1975:** 40 svisaj frankoj.

La antaŭpagon de entute 24,5 sv.fr. bonvolu sendi al la bankkonto de **INTERNACIA KULTURA SERVO**, 32000-009-488 ĉe Privredna banka Zagreb, Jugoslavio, plej malfrue ĝis la 1-a de junio 1975. La reston vi pagos post la ricevo de la libroj.

EŬROPA DOKUMENTARO: Ĉar pluraj dekoj da mendintoj de tiu subteninda eldonaĵo sendis al ni erare malaltan sumon, ni atentigas, ke la abono por la kuranta jaro kostas 13,- (por Nederlando 13,52) gld.

TUTMONDAJ INFANOJ (6 ĝis 14 jaroj)! La Urbeŝtaro kaj Centro de Esperanto, Santa Colona de Gramanet invitas partopreni la 3an Int. Ekspozicion-Konkurson de pentraĵoj pri libera temo (akvareloj, minimume 25x25cm), limdato — la 31a de julio 1975. Sendu al: C.E.Puiscastellar, Esperanto, Avda Ansaldo 79, Santa Colona de Gramanet (Barcelona), Hispanio. Informoj ĉe la sama adreso.

HELSINGØR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago


La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago. Programo senpage havebla ĉe Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør, Danlando.

LIBROJ EL KAJ PRI FRISLANDO EN ESPERANTO



FRISAJ RAKONTOJ

f 6,= (+ sendokosto)



P. Wijbenga

DORSE KONTRAŬ LA MURO

f 9.90 (+ sendokosto)



Nynke van Hichtum

LA DEKOPO DE AFKE

Ĵus aperis: la fama libro
por 8-80 jaraj homoj!

f 9,= (+ sendokosto)

Mendoj:

Libro-servoj kaj D. Visser
Engelsestraat 20 - Leeuwarden
Nederlando

REVENIS KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo

ĴUS APERIS la dua eldono de la jam (fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vige ilustrita originala ridincitilo kun la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj", tiel furoris tra la mondo, ke la unua eldono el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis havebla nur prunte aŭ ŝtele.

Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) gld. Mendu ĉe UEA aldonante 10 procentojn por la sendokostoj.

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon


141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris. Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando



Dan
to I

En unu volumo — ĉio sciinda pri la lingvo kaj Movado

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.